

# EL POPOLA ĈINIO

N-ro 12

Decembro 1968

# Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong

En la efektivigo de la proletara revolucio en eduko, necesas havi la gvidadon de la laborista klaso kaj la partoprenon de la laboristaj amasoj kiuj, en kunlaborado de la batalantoj de la Liberiga Armeo, efektivigos revolucion triflankan kombiniĝon kune kun la aktivuloj inter la lernantoj, instruistoj kaj laboristoj en la lernejoj, kiuj decidis konduki la proletaran revolucion en eduko ĝis la fino. La laboristaj propagandaj taĉmentoj devas longdaŭre resti en la lernejoj, partopreni la plenumon de ĉiuj taskoj de batalo, kritiko kaj reformo en la lernejoj, kaj por ĉiam gvidi la lernejojn. En la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso.



Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ



Foto pri la akceptado fare de Prezidanto Maŭ Zedong de la Centra Komitato de la Komunistara Partio de Ĉinio. En la antaŭa vico, la kamarado Marko; la tria de maldekstre: Kamarado Nathanaili.

# Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Akceptis Kamaradon Balluk kaj Ĉiujn Membrojn de Albanca Partia kaj Registara Delegacio

Nia plej estimata kaj amata granda gvidanto kamarado Maŭ Zedong, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunistara Partio de Ĉinio, kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ, vicprezidanto de



Maŭ kaj vicprezidanto Lin Biaŭ al la Albana Partia kaj  
maldekstre: kamarado Balluku; la kvara de dekstre:  
unua de dekstre: kamarado Theodhosi; en la dua vico,

Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, akceptis en la 5-a de oktobro kamaradon Beqir Balluku, estron de la Albana Partia kaj Registara Delegacio, membron de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj vicprezidanton de Konsilantaro de Ministroj kaj kundaŭre Ministron de Defendo de la Popola Respubliko de Albanio, kaj aliajn membrojn de la delegacio: kamaradon Rita Marko, membron de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro, vicprezidanton de la prezidantaro de la Popola Asembleo de la Popola Respubliko de Albanio kaj unuan sekretarion de la Dures-Regiona Komitato de la Partio de Laboro; kamaradon Adil Carcani, membron de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj vicprezidanton de la Konsilantaro de Ministroj de la Popola Respubliko de Albanio; kamaradon Koco Theodhosi, alternan membron de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj Ministron de Industrio kaj Minprodukto de la Popola Respubliko de Albanio; kaj kamaradon Vasil Nathanaili, ambasadoron de la Popola Respubliko de Albanio al Ĉinio.

Prezidanto Maŭ kaj vicprezidanto Lin varme manpremis kaj kune fotografiĝis kun kamarado Balluku k. a., kaj poste tre intime kaj amike interparolis kun ili.

La akceptadon ĉeestis kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Giang King, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan, Hie Fuĝi, Huang Jongŝeng, Vu Fahian, Je Kjun, Vang Donghing kaj Ven Juĉeng.



En la ĝojiga tago de la 19-a datreveno de la fondiĝo de la popola respubliko diversnaciecaj oĝantoj en Pekino varme akklamas la plenan ruĝiĝon de la tuta lando escepte Tajvan-provincon.

Vidinte Prezidanton Maŭ la reprezentantoj de laboristoj foje kaj refoje krias: "Vivu Prezidanto Maŭ, vivu, longe vivu!"




# Prezidanto Maŭ Ĝoje Celebris la Nacian Feston Kune kun la Tutlandaj Laboristaj Reprezentantoj kaj Ĉefurbaj Armeanoj kaj Civiluloj

**L**A unuan de oktobro, nia granda instruanto kaj granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ ĝoje celebris la solenan feston de ĉiuj nacioj de nia lando — la 19-an datrevenon de fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, sur Tian-anmen-pordego, kune kun la eminentaj reprezentantoj de ĉiulokaj laboristoj de la tuta lando kaj kvincent mil armeanoj kaj civiluloj de nia ĉefurbo. Tiu ĉi grandioza festotago brilis per la granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ; ĝi estis grandioza festotago, kiam centmilionoj da armeanoj kaj civiluloj varme hurais, ke la laboristaro de nia lando suriris la politikan


arenon de batalo, kritiko kaj reformo en diversaj superstrukturaj sferoj; ĝi estis granda festotago, kiu manifestis la decidemon de la centmilionoj da armeanoj kaj civiluloj de nia lando por bone konduki batalon, kritikon kaj reformon kaj batalakiri la plenampleksan venkon de la granda proletara kultura revolucio. Sur Tian-anmen-placo okazis solena mitingo kaj parado por celebrado.

Matene, la ruĝa suno ŝprucis el la horizonto kun forte brilaj radioj. Vasta armeo de laboristoj kaj revoluciaj amasoj kun alte tenataj ruĝaj flagoj kaj la ruĝa libro *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la manoj kolektiĝis



*La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ revuas la paradon de sur la pordego Tian-anmen.*

*Plena de revolucia entuziasmo, la laborista propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong kun alta batalvolo trapasas Tian-anmen-placon por akcepti la revuon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.*





sur Tian-anmen-placo kaj Orienta Ĉang-anstrato. Sur la revuaj terasoj staris ĉirkaŭ dekmil laboristaj reprezentantoj el diversaj lokoj de la patrolando, reprezentantoj de propagandaj taĉmentoj de la ĉefurbaj laboristoj pri la penso de Maŭ Zedong, reprezentantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj revoluciaj junaj batalantoj de la ruĝa gvardio. Sur la revuaj terasoj staris krome proletaraj revoluciaj batalantoj el diversaj landoj de la kvin kontinentoj kaj aliaj eksterlandaj geamikoj, kaj ankaŭ niaj samlandanoj el Hongkong kaj Aŭmen kaj elmigrintoj de nia lando.

Je la 10-a a. m., nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko Vicprezidanto Lin Biaŭ viglapaŝe ascendis Tian-anmen-pordegon kaj la orkestro ekludis impone *Ruĝas la Oriento*. Tiam tuj eksplodis longdaŭra kaj varmega vivuado sur Tian-anmen-placo kaj la revuaj terasoj: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu Prezidanto Maŭ!" Prezidanto Maŭ montriĝis forte sana, vigl-anima kaj energi plena. Li mansalutis de tempo al tempo la ĉeestantojn. Kaj la amasoj mil-kaj dekmil-foje ĝojkriadis, svingante la ruĝan revolucionan trezoran libron por plene esprimi sian profundan proletaran sentimenton de senlima amo kaj senlima fideleco al la granda gvidanto

Prezidanto Maŭ. Sur la placo, cent mil homoj formis per la bukedoj en siaj alte levitaj manoj spektaklan bildegon de sunfloroj sin turnantaj al la suno. Kaj alte super la placo, naŭ kolosaj ruĝaj balon-lanternoj paradas kun naŭ gigantaj oraj ideografiaĵoj surskribitaj kiuj signifas "LONGAN, LONGAN VIVON AL PREZIDANTO MAŬ", kiuj esprimas la komunan koran deziron de la centmilionoj da popolanoj.

Sur Tian-anmen-pordego revuis la paradon kune kun Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin, gekamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Giang King, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan, Hie Fuĝi, Huang Jongŝeng, Vu Fahian, Je Kjun, Vang Donghing, Ven Juĉeng, kaj aliaj partiaj kaj registaraj gvidantoj, respondecaj gekamaradoj de la revoluciaj komitatoj de la 29 provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj kaj 286 laboristaj reprezentantoj.

Inter la invititaj partoprenantoj de la soleno sur Tian-anmen-pordego estis la Albana Partia kaj Registara Delegacio kun Beqir Balluku kiel la estro, la Pakistana Registara Amikeca Delegacio kun Syed Fida Hassan kiel la estro, vjetnamaj kaj laosaj batalamikoj venintaj de la plejfronto por rezisti kontraŭ la usona imperiismo kaj proletaraj revoluciaj

*Ĉefurbaj laboristoj akceptas la revuon de Prezidanto Maŭ svingante la brile ruĝajn Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.*





*Reprezentantoj de ĈPLA sur la revua teraso*


batalantoj kaj internaciaj amikoj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj aliaj kontinentoj.

Kamarado Hie Fuĝi, ĉefkomitatano de la Pekina Revolucia Komitato, proklamis komencon de la celebra soleno, kaj tiam laŭte eksonoris la Nacia Himno kaj ektondris festaj salvoj.

Vicprezidanto Lin Biaŭ donis gravan paroladon.

La parolado de Vicprezidanto Lin Biaŭ forte stimulis la vastajn revoluciajn amasojn. Kaj ĉi tiuj varme kriegis: “Firme sekvu la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj bone konduku batalon, kritikon kaj reformon kun seriozeco!” “Streĉu plene la energion kaj strebu forte antaŭen por levi novan altan tajdon en tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto!”

Post la parolado de kamarado Lin Biaŭ, komenciĝis grandioza parado de la amasoj.




Per heroaj paŝoj antaŭen marŝis la potencaj kolonoj de la vasta armeo de la paradantoj. Inter la kolonoj, giganta landkarto de Ĉinio sur bela ĉaro aparte altiris al si la atenton. Sur la fono de la skarлата mapo brilis ses oraj ideografiaĵoj signifantaj “BONA ESTAS LA REVOLUCIA KOMITATO”. Paradantoj en kostumoj diversnaciaj kantadis kaj dancadis dum la marŝo kaj kore aklamadis al starigo de la revoluciaj komitatoj en ĉiuj 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio, escepte de Tajvan-provinco. La paradaj vicoj de la laboristaro de la ĉefurbo raportis al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ la gigantajn fruktojn akiritajn en tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto per grandaj paradaj ĉaroj bele aranĝitaj. Ili marŝis antaŭen grandpaŝe kun alte tenataj kolosaj slogantabuloj kun la surskribaĵoj “LA LABORISTA KLASO NEPRE DEVAS GVIDI ĈION”, “SERIOZE KAJ BONE KONDUKU BATALON, KRITIKON KAJ REFORMON”. La granda batalanta laboristaro de Ĉinio iras avangarde sur la plejfronto

de batalo, kritiko kaj reformo kun alta revolucia respondeco kaj heroeco de la gvidanta klaso. Ili esprimis, ke sub direktado de la penso de Maŭ Zedong kaj sub saĝa gvidado de la proletara komando kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicedestro, la laborista klaso tute kapablas preni sur sin la grandan historian taskon de batalo, kritiko kaj reformo en diversaj superstrukturaj sferoj.

La plej fidinda aliancano de la laborista klaso — la malriĉkamparanoj kaj malsupera mezkamparanoj ricevis revuadon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ portante gigantan slogantabulon kun la surskribo “VIVU LA POPOLA KOMUNUMO!” kaj kun siaj riĉaj rikoltaĵoj en la revolucio kaj produktado. La paradon partoprenis ankaŭ la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiu defendas la socialisman patrolandon, plenumas la laboron subteni la industrion, subteni la agrikulturon kaj subteni la maldekstrulojn kaj fari militan kontrolon kaj milita-politikan trejnadon, kaj

*Tian-anmen-placo en la Nacia Festo*



faras novajn kontribuojn sur la politika areno de gvidado de batalo, kritiko kaj reformo en la superstrukturo, agante kiel firma subtenanto de la laborista klaso. Ankaŭ junaj ruĝgvardiaj batalantoj, revoluciaj instruistoj kaj lernantoj, ŝtataj oficistoj, revoluciaj urbanoj kaj revoluciaj batalantoj de literaturo kaj arto ricevis revuadon de Prezidanto Maŭ kun senlima amo al la granda gvidanto.

Varme bonvenigataj de la paradantaj amasoj estis la albanaj batalamikoj el la plejfronto kontraŭimperiisma kaj kontraŭreviziisma, la vjetnamaj kaj laosaj batalamikoj el la plejfronto por nacisavo kontraŭ la usona imperiismo kaj internaciaj amikoj el la kvin kontinentoj, kiuj partoprenis la revuadon. La paradantaj amasoj kriadis senĉese sloganojn kiaj “Decideme frakasu la intrigon de Usono kaj Sovetunio dividi la mondon en koluzio!” “For la usonan imperiismon!” “For la sovetunian reviziismon!” “For la diverslandajn reakciularojn, kiuj sekvas la usonan imperiismon kaj la sovetunian reviziismon!” “Firman subtenon al la heroa Albanio en ĝia retiro el la Varsovia Traktato!” “Firman subtenon al la heroa vjetnama popolo en ĝia ĝisfina konduko de la granda rezistmilito kontraŭ la usona imperiismo por nacisavo!” “Ni nepre liberigos Tajvan!”, ktp.

Je la dekdua, ĉiuj paradantaj vicaroj trapasis Tian-anmen-placon. Tiam artaj fajraĵoj kaj sennombraj koloraj balonoj flugis alten super la placo. Kaj laŭte kantante la *Kanton al la Socialisma Patrolando* centmil homoj torentis tajde al Tian-anmen-pordego, al Prezidanto Maŭ. Mil- kaj dekmil-foje ili ĝojkriadis: Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!

Vespere je la oka, en ĝojkriado “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin viglapaŝe suriris Tian-anmen-pordegon kaj ĝoje pasigis la nacifestan nokton kaj ĝuis la pompajn festajn artfajraĵojn kune kun la eminentaj reprezentantoj de la tutlanda laboristaro, la vastaj amasoj de armeanoj kaj civiluloj de la ĉefurbo kaj ĝeamikoj el la kvin kontinentoj. Sur Tian-anmen-pordego, Prezidanto Maŭ akceptis kun intima sento la eminentajn reprezentantojn de la tutlanda laboristaro kaj reprezentantojn de la revoluciaj komitatoj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Dum la aŭdienco, ekboladis ĝojo sur Tian-anmen-pordego kaj aperis kortuŝa sceno de senlima amo de la revoluciaj batalantoj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Same kiel en la aliaj lokoj de nia lando, grandioza kaj belega sceno revolucia regis en Pekino dronanta en la nacifesta nokto kun sonoraj triumfaj kantoj kaj pompe brilaj artfajraĵoj.

### *Pompe bunta nokto de la Nacia Festo*



# Parolado de Kamarado Lin Biaŭ en la Celebra Kunveno de la 19-a Datreveno de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Gekamaradoj kaj geamikoj:

La granda Ĉina Popola Respubliko, kiun persone fondis kaj gvidas nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, jam triumfe iris sur la larĝa vojo de socialismo 19 jarojn.

En la tempo de celebros de tiu brila festo, mi esprimas, en la nomo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj en la nomoj de la Centra Komitato de la Partio, la ĉina registaro, la Komisiono pri Militaj Aferoj kaj la Grupo de Kultura Revolucio ambaŭ de la Centra Komitato de la Partio, plej varmajn salutojn al la laborista klaso, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, la Popola Liberiga Armeo, la junaj ruĝgvardiaj batalantoj, la revoluciaj kadroj kaj la revoluciaj intelektuloj, kiuj faris elstarajn, meritoplenajn kontribuojn en la granda proletara kultura revolucio, kaj plej varman bonvenigon al niaj kamaradoj kaj amikoj el diversaj landoj de la mondo!

Nun, la granda proletara kultura revolucio de nia lando jam akiris grandajn venkojn. Revoluciaj komitatoj estas establita en ĉiuj dudek naŭ provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj tra la tuta lando, escepte de Tajvan-provinco. Industrio, agrikulturo, scienco kaj tekniko, revoluciaj literaturo kaj arto ĉiuj estas en prosperado. La kontraŭrevolucia intrigo de la ĉina Ĥruŝĉov kaj la plenmana da liaj agentoj en diversaj lokoj por restaŭri kapitalismon jam komplete bankrotis. Hardita tra la 19-jara klasbatalo kaj precipe tra la ŝtormo de la nuna granda proletara kultura revolucio, la diktaturo de la proletaro de nia lando fariĝis senprecedence solida kaj potenca.

Ĉiuj ĉi tiuj venkoj kaj atingoj estas la fruktoj de la heroo luktado farata de la centmiliono nombrantaj revoluciaj amasoj de la tuta lando sub la saĝa gvido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Nun, la centra tasko staranta antaŭ ni estas, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ, **serioze kaj bone konduki la batalon, kritikon kaj reformon**. Tio signifas solidigi kaj disvolvi la revoluciajn komitatojn, bone konduki la amasan kritikadon, bone purigi la klasajn vicojn, bone reordigi kaj konstrui la partiajn organizojn, bone fari edukon revolucion, bone elitigi kaj simpligi la administran strukturon, reformi malraciajn regulojn kaj sistemojn, **teni la revolucion kaj stimuli la produkton** kaj konduki la grandan proletaran kulturalan revolucion ĝis la fino!

Prezidanto Maŭ montris: **La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion**. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, laboristaj propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong konsistantaj el miloj kaj miloj da industriaj laboristoj en la tuta lando, en kunago kun la propagandaj taĉmentoj de la penso de Maŭ Zedong de la Popola Liberiga Armeo, jam venis aŭ venas en altajn, mezajn kaj elementajn lernejojn kaj en ĉiujn lokojn, kie troviĝas amase intelektuloj, kaj suriras la politikan scenejon de batalo, kritiko kaj reformo en ĉiuj kampoj de la superstrukturo. Tio estas granda evento en la sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento. Kvankam la daŭro estas ankoraŭ kompare mallonga, tamen la revolucia praktiko jam pruvis kaj daŭre pruvos, ke kune kun sia firma aliancano la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj kune kun la vastaj revoluciaj amasoj, la ĉina laboristaro longe provita en heroaj bataloj certe kreos ankoraŭ pli brilajn meritojn sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de Prezidanto Maŭ!

En la nomo de la proletara komandejo estrata de Prezidanto Maŭ, mi alvokas ĉiujn proletarajn revoluciulojn tra la tuta lando strikte sekvi la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, plene efektivi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj kontinue fari novajn

kontribuojn en la batalo por akiri kompletan venkon de la granda proletara kultura revolucio. Samtempe, ĉiuj komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo devas ĉiam teni viglan singardemon, plifortigi la pretecon al milito kaj defendi la landon, la diktaturon de la proletaro kaj la grandan proletaran kulturalan revolucion. Ni nepre liberigos Tajvan kaj estas pretaj je ĉiu momento ekstermi ĉiun malamikon, kiu aŭdacos nin invadi!

Nun, la situacio internacia kaj enlanda estas bonega. La bataloj de la tutmondaj revoluciaj popoloj leviĝas tempeste. La tagoj de la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj ĉiulandaj reakciuloj estas tre malfacilaj. Ilia kontraŭrevolucia regado ne daŭros longe. Kio ilin atendas, estas la kompleta disfalo de la malnova kapitalisma mondo, kaj la venko de la proletara socialisma revolucio en la tuta mondo.

Unuiĝu proletoj de la tuta mondo!  
Unuiĝu proletoj de la tuta mondo kun la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj!

For la usonan imperiismon!

For la sovetunian reviziismon!

For la reakciulojn de ĉiuj landoj!

Frakasu la intrigon de koluzio inter la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo por dividi la mondon!

Vivu la kompleta venko de la granda proletara kultura revolucio!

Vivu la venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!

Vivu la diktaturo de la proletaro!

Vivu la granda Ĉina Popola Respubliko!

Vivu la granda Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la ĉiamvenkaj marksismo, leninismo kaj penso de Maŭ Zedong!

Vivu nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ! Vivu! Longe vivu!

# Vivu la Ĉiuflanka Venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio!

—Varma Aklamo al la Starigo de la Revoluciaj Komitatoj de Ĉiuj  
Provincoj, Municipoj kaj Aŭtonomaj Regionoj  
(Escepte de Tajvan-provinco) de Ĉinio

Ĉefartikolo de *Jurnaloj Renmin Ribao kaj Jiefangjun Bao*

**T**RIUMFAJ kantoj sonoradas sude kaj norde de Tianŝan-montaro kaj la suno ore brilas super la tibeta altebenejo. Dum centoj da milionoj da armeanoj kaj popolanoj tra la tuta lando marŝas de venko al venko sub kuraĝigo de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ, sukcese naskiĝis samtempe la revoluciaj komitatoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, starantaj ĉe la ĉinaj sudokcidenta kaj nordokcidenta antaŭ-postenoj de la batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo!

Nun revoluciaj komitatoj jam fondiĝis en ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando, escepte de Tajvan-provinco. Tiu ĉi ekstreme grandioza spektaklo, ke ruĝas la tuta lando, estas grava evento en akirado de la ĉiuflanka venko en la granda proletara kultura

revolucio. Ĝi indikas, ke la tuta movado jam eniris la stadion de batalo, kritiko kaj reformo en tutlanda skalo. Tio ĉi estas granda venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj multe ĝojinda afero en la politika vivo de la sepcentmiliono popolo de nia lando!

Ni sendas varmajn gratulojn al la revoluciaj popolanoj de ĉiuj nacioj en Tibeto kaj Hingiang, al ĉiuj komandantoj kaj batalantoj de la trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo garnizonantaj en Tibeto kaj Hingiang kaj al la batalantoj-kultivantoj en la Produkta kaj Konstrua Korpuso de la Hingiang-a Milita Regiono!

Ni sendas varmajn batalajn salutojn al la grandnombraj proletariaj revoluciaj kunbatalantoj

tra la tuta lando, kiuj brave marŝis antaŭen firme sekvante la revolucian linion de Prezidanto Maŭ dum la lastaj du jaroj!

En la granda proletara kultura revolucio, la proletaraj revoluciuloj kaj la revoluciaj amasoj de ĉiuj nacioj en Tibeto kaj Hingiang firme staris ĉe la flanko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj serioze plenumis serion da plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ. Kun la firma kaj forta subteno de la Popola Liberiga Armeo, ili faris ripetadan lukton kaj obstinan batalon kontraŭ la klasaj malamikoj, finfine elfosis la agentojn de la ĉina Ĥruŝĉov en Hingiang — Vu Guang, Lju Gianĵen, Ĝang Ĝonghan, Iminov, Burhan k. a. — kaj liajn agentojn en Tibeto — Ĝoŭ Ĵenŝan, Vang Kimej k. a. — kiuj estas plenmano da renegatoj, Uson-Ĉiangkajŝek-aj spionoj, spionoj de la sovetuniaj reviziistoj kaj de Britio, kontraŭ-revoluciaj reviziistoj kaj nacisplitistoj, plene frakasis la tagsonĝon de tiuj klasaj malamikoj pri restaŭro de kapitalismo kaj disrompo de la unueco de la patrolando kaj donis pezan baton al la intrigo de imperiismo, moderna reviziismo kaj reakciularoj por fari renversadon kaj subfosadon en la regionoj de Tibeto kaj Hingiang.

En la granda batalo dum la 20 monatoj de la leviĝo de la Januara Ŝtormo en Ŝanhajo ĝis la fondiĝo de la du revoluciaj komitatoj en Tibeto kaj Hingiang, la armeo kaj popolo de la tuta lando jam plenumis la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ **“Proletaraj revoluciuloj, unuigu por depreni regpotencon de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon”**, kaj jam akiris decidan venkon de la granda proletara kultura revolucio en tutlanda skalo.

Prezidanto Maŭ instruas nin: **“Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo celas depreni kaj firmigi la regpotencon.”** La klasbatalo sub la diktaturo de la proletaro restas esence demando de regpotenco. La burĝaro volas renversi la proletaran diktaturon, dum la proletaro volas firmigi sian diktaturon. La plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estas ĝuste reprezentantoj de la burĝaro en la Partio. La proletaro reprenis la de ili uzurpitan parton de la partia, registara, financa kaj kultura potenco, tio estas serioza batalo en kiu la burĝaro intencas restaŭriĝi kaj la proletaro oponas ĝian restaŭron. Tio ĉi estas daŭrigo de la proletara revolucio kaj granda politika revolucio kondukita de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluataj klasoj.

La starigo de la revoluciaj komitatoj en ĉiuj provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj de la lando proklamis la kompletan bankroton de la kontraŭrevolucia intrigo de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en diversaj lokoj por ŝanĝi la proletaran diktaturon en burĝaran diktaturon. Ĝi frakasis ĉiujn kontraŭrevoluciajn kalumniojn disemitajn de la usona imperiismo kaj la sovetunia moderna reviziismo kaj krevigis, kvazaŭ sapveziĝojn, la arogan revon de imperiismo kaj moderna reviziismo pri efektivigo de “paca evoluo” en Ĉinio.

La starigo de la revoluciaj komitatoj en ĉiuj provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj tra la lando demonstras la senkomparan potencon de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong post ĝia ekteno de centoj da milionoj da revoluciaj popolanoj. Tio multe fortigis la proletaran diktaturon kaj ege riĉigis kaj disvolvis marksism-leninism.

Ni tutkore kaj varmege aklamas al la granda venko gajnita de la revolucia popolo sub la gvido de la proletara komandejo kun Prezidanto Maŭ kiel ĝia estro kaj Vicprezidanto Lin kiel ĝia vicestro.

Ni firmdecide disvolvos la ĝisfundan revolucionan spiriton de la proletaro, strikte sekvos la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ kaj firmigos kaj disvolvos tiun ĉi venkon per persista kaj senlaca batalo!

Lastatempe, Prezidanto Maŭ elmetis al la tuta lando la grandan alvokon **“serioze kaj bone konduki la batalon, kritikon kaj reformon”**, kaj li montris: **“La batalo, kritiko kaj reformo en fabriko ĝenerale trapasas jenajn etapojn: fondo de revolucia komitato de triflanka kombiniĝo, amasa kritiko, purigo de la klasaj vicoj, reordigo de la partiaj organizoj, elitigo kaj simpligo de la organiza strukturo, ŝanĝo de neraciaj reguloj kaj sistemoj kaj sendo de personoj laborantaj en oficejoj al bazaj unuoj.”**

La plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ spegulas la objektivan leĝon de la granda proletara kultura revolucio atinginta la stadion de batalo, kritiko kaj reformo. Ĝi koncentre esprimas la urĝajn postulojn de la laborista klaso kaj la vastaj revoluciaj amasoj kaj klare indikas la centran taskon, kiun alfrontas la revoluciaj komitatoj de ĉiuj niveloj.

Bone plenumi la taskon de batalo, kritiko kaj reformo en ĉiu unuo kaj ĉiu sekcio estas baza parto por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Tio estas demando de fundamenta graveco



por prevento de restaŭro de kapitalismo kaj firmigo kaj disvolvo de la diktaturo de la proletaro en la estontaj generacioj. Tio ĉi estas batalo por gajni plenan venkon de la granda proletara kultura revolucio. La revoluciaj komitatoj de ĉiuj niveloj nepre devas energie konduki batalon, kritikon kaj reformon, por ke ili, en plenumo de tiu ĉi granda historia tasko, disvolu pli grandan revolucionan potencon kaj akiru por si firmiĝon kaj disvolviĝon.

Por bone konduki la kampanjon de batalo, kritiko kaj reformo, estas necese persisti en la gvidado de la laborista klaso, **“plene disvolvi la gvidan rolon de la laborista klaso en la granda kultura revolucio kaj ĉiuj laboroj”**, garantii rapidan kaj senbaran efektivigon de ĉiu instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ĉiu ordono de la proletara komandejo, firmdecide oponi la reakcian burĝaran teorion pri “multaj centroj”, t. e. la teorion pri “neniu centro”, unuigi la penson, samtaktigi la paŝojn kaj unuecigi la agojn sub la komando de la proletara komandejo kun Prezidanto Maŭ kiel ĝia estro kaj Vicprezidanto Lin kiel ĝia vicestro. Samtempe estas necese armi la laboristajn amasojn per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, senĉese altigi la politikan konscion de la laborista klaso, por ke la laborista klaso povu pli bone plenumi sian grandan historian mision gvidi ĉion en la eduka revolucio, en la batalo, kritiko kaj reformo en ĉiuj sferoj de la superstrukturo kaj en ĉiu laboro por efektivigi la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ.

Por bone konduki la kampanjon de batalo, kritiko kaj reformo, estas nepre necese plifortigi la ideologi-politikan laboron, serioze fari enketon kaj esploradon kaj bone eltrovi tipajn ekzemplojn. La revoluciaj komitatoj de ĉiuj niveloj devas firme plenumi ĉiujn proletarajn politikojn elmetitajn en la redakcia noto de la gazeto *Ruĝa Flago*, publikigita en la ĵurnaloj de la 5-a de septembro\*. Tio estas la voĉo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Respondecaj membroj de la revoluciaj komitatoj devas persone selekti iujn laborpunktojn kaj akiri sperton en ili por gvidi sian tutan laboron kaj raporti la rezultojn al la Centra Komitato de la Partio. Ili devas strikte ligiĝi kun la amasoj, aŭskulti la opiniojn de la vastaj amasoj kaj doni sufiĉan atenton al venkado de ĉiuj tendencoj de sinizolo for de la amasoj.

Prezidanto Maŭ diris: **“Akirinte la venkon, ni neniel devas malstreĉi nian singardemon kontraŭ la frenezaj venĝaj intrigoj de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj.”** Ni nepre devas konduki profundan kaj

longdaŭran revolucionan amasan kritikadon, aktive lanĉi furiozajn atakojn kontraŭ la klasa malamiko, serioze purigi nian klasan vicaron, firme, trafe kaj senkompate bati la plenmanon da renegatoj, spionoj, morte obstinaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la nesufiĉe remulditaj bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstruloj, kaj elfosi ĉiujn kontraŭrevoluciulojn sin kaŝantajn en malhelaj anguloj por fari ĝenojn kaj subfosadon. Ni nepre devas plifortigi la solidarecon inter la armeo kaj la popolo, plifortigi preparadon kontraŭ milito, plifortigi la landliman, maran kaj aeran defendon, kaj ĉiam esti pretaj por liberigi Tajvan kaj defendi la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de nia lando. Se la malamiko aŭdacas tuŝi la sanktan teritorion de nia lando kaj lanĉi armitan invadon, ni ĝin ekstermos decideme, plene, tute kaj komplete.

Ni marŝu antaŭen grandpaŝe, firme sekvante la grandan strategian dispozicion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, por venke plenumi la grandan historian taskon de batalo, kritiko kaj reformo! Nia granda socialisma patrolando en la sunbrilo de la penso de Maŭ Zedong certe aperos eĉ pli majesta antaŭ la popoloj de la tuta mondo!

Vivu la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!

Vivu la ĉiufanka venko de la granda proletara kultura revolucio!

---

*\*La 5-an de septembro, en niaj ĵurnaloj aperis la redakcia noto de la gazeto Ruĝa Flago pri ŝanhaja enketa raporto. Tiu noto montras: Oni devas doni atenton pri la demando reeduki la grandan nombron da altlernejaj kaj mezlernejaj diplomitoj, kiuj komencis labori jam antaŭlonge aŭ lastatempe, por ke ili kombiniĝu kun la laboristoj kaj kampanoj. Iuj el ili certe jam bone efektivigis tiun kombiniĝon kaj faris inventojn kaj elpensis novojn. Oni devas raporti pri ili por kuraĝigo. La vere senesperaj, t. e. la nekuraĉeblaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj aŭtoritatoj, kiuj kaŭzis indignegon ĉe la amasoj kaj devas esti faligitaj, estas ekstreme malmultaj. Eĉ al tiuj oni devas montri eliran vojon. Fari alimaniere ne estas la politiko de la proletaro.*

# La Laborista Klaso Nepre Devas Gvidi Ĉion

JAŬ VENJUAN

**G**RANDA alttajo de batalo, kritiko kaj reformo estas alproksimiĝanta. La publikigo de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj la sistema eniro, sub gvidado, de la granda armeo de industriaj laboristoj en lernejojn kaj ĉiujn aliajn unuojn, kie batalo, kritiko kaj reformo ankoraŭ ne estas bone faritaj, estas signaloj pri la alveno de la alttajo. Tiu ĉi alttajo aperas post la plenumo de serio da laboroj, inkluzive la fondon de revoluciaj komitatoj en provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj, grandan amasan kritikadon kaj purigadon de la klasaj vicoj. Ĝi kaŭzos profundajn ŝanĝojn en ĉiuj sferoj, forte sturmos ĉiujn tiujn partojn de la superstrukturo, kiuj ne konformas al la socialisma ekonomia bazo, edukos la vastajn popolamasojn, frakosas la kaŝitajn reakciulojn, kondukos la grandan proletaran kulturan revolucion al plenampleksa venko kaj multe akcelos la disvolviĝon de la produktaj fortoj de la socio.

La grava tasko nun staranta antaŭ la revoluciaj komitatoj de ĉiuj niveloj estas serioze plenumi la laboron de batalo, kritiko kaj reformo sen perdo de tempo. Por fari tiun ĉi taskon, estas necese persisti pri la gvidado fare de la laborista klaso kaj **“plene disvolvi la gvidan rolon de la laborista klaso en la granda kultura revolucio kaj ĉiuj laboroj.”**

La slogano substitui la diktaturon de la burĝaro per tiu de la proletaro estis elmetita ekde la tempo, kiam marksismo komencis formiĝi en la mezo de la 19-a jarcento. 120 jaroj jam pasis de post tio. Nur imperiismo, la bienula klaso, la burĝaro kaj iliaj agentoj — la novaj kaj malnovaj reviziistoj — oponas kontraŭ tiu ĉi ĝisfunde revolucia slogano. La Komunista Partio de Ĉinio prenas ĉi tiun sloganon kiel sian fundamentan programon.

Por efektiviĝi tiun ĉi sloganon estas necese unuiĝi kun la vastaj ne-laboristaj amasoj, ĉefe la kamparanaj amasoj, la urbaj etburĝaraj amasoj kaj tiuj intelektuloj, kiuj estas remuldeblaj, kaj gvidi ilin antaŭen.

La granda proletara kultura revolucio, dum la tuta procezo, estas kondukata sub la ekskluziva gvido de unusola klaso — la klaso laborista. Nia partio estas la avangardo de la proletaro. La proletara komandejo, estrata de Prezidanto Maŭ, kun Vicprezidanto Lin kiel sia vicestro, koncentre reprezentas la interesojn de la laborista klaso, malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj aliaj vastaj laborantaj amasoj, estas la sola gvidanta centro de la tuta Partio, tuta armeo, tuta lando kaj vastaj revoluciaj popolamasoj. La proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj ĉiuj liaj instrukcioj spegulas la urĝajn postulojn de la laborista klaso kaj de la centoj da milionoj da revoluciaj popolanoj, enkorpiĝas la firman gvidon de la proletaro super la tuta granda proletara kultura revolucio. Ĝuste sub la gvido de la proletara komandejo kun Prezidanto Maŭ ĉe la kapo, eblas irigi la grandan proletaran kulturan revolucion, kiun partoprenas centoj da milionoj da revoluciaj amasoj. Por persisti pri la gvidanteco de la laborista klaso, oni devas antaŭ ĉio garantii rapidan kaj glatan plenumon de ĉiu instrukcio de la granda gvidanto de la laborista klaso Prezidanto Maŭ kaj de ĉiu ordono de la plej supera batala komandejo de la proletaro. Estas necese oponi kontraŭ la teorio de “multaj centroj”, t. e., la teorio de “neniu centro”, montfortresa spirito, sektismo kaj diversaj aliaj reakciaj burĝaraj tendencoj, kiuj subfosas la gvidantecon de la laborista klaso. La revoluciaj komitatoj en ĉiuj lokoj estas potencorganoj de la diktaturo

de la proletaro, kaj ĉiuj unuoj devas sin submeti al la gvidado de la revoluciaj komitatoj. En nia lando, estas nepermesate ekzisti ia ajn granda aŭ malgranda “sendependa regno” aganta kontraŭ la proletara komandejo de Prezidanto Maŭ. La malnova urba partia komitato de Pekino, tiu “sendependa regno” penetrebla nek per pinglo nek per akvo, kiu rezistis kontraŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, estis rimedo uzata de la bando da grandaj konspirantoj, la ĉina Ĥruŝĉov kaj aliaj, por oponi kontraŭ la gvido de la laborista klaso kaj restaŭri kapitalismon. Tiu ĉi “sendependa regno” estis komplete ruinigita de la revolucia ŝtormo. Tiun historian lecionon de klasa batalo devas preni al si en la memoron ĉiuj revoluciuloj. Ankaŭ la civitanoj de la grandaj aŭ malgrandaj sendependaj regnoj sub la regado de burĝaraj elementoj en diversaj lokoj tra la lando devas studi tiun ĉi lecionon.

La eniro de la laboristaj propagandaj taĉmentoj en la kampon de edukado estas granda evento mondska. De la antikveco, la lernejoj estas monopoligitaj de la ekspluataj klasoj kaj ties gefiloj. La stato iom pliboniĝis post la

Liberiĝo, sed fundamente la lernejoj restas ankoraŭ monopoligitaj de la burĝaraj intelektuloj. Inter lernantoj el tiuj lernejoj, iuj povas kombiniĝi kun kaj servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj pro diversaj kialoj (ĉar, ĝeneraldire, ili mem aŭ iliaj instruistoj estas kompare bonaj, aŭ ili ricevis la influon de siaj familioj, parencoj aŭ amikoj, sed ĉefe de la socio), dum aliaj ne. En ŝtato de la diktaturo de la proletaro ekzistas la serioza fenomeno de batalo pri gvidanteco inter la burĝaro kaj la proletaro. En tiu ĉi granda proletara kultura revolucio, la junaj batalantoj de Ruĝa Gvardio leviĝis en ribelo kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj la reakciaj fortoj de la burĝaro en la lernejoj portempe ricevis pezan baton. Sed nelonge poste, iuj denove komencis kaŝe aktivadi. Ili incitis la amasojn al batalo unu kontraŭ alia, subfosis la grandan kulturalan revolucion kaj la laborojn de batalo, kritiko kaj reformo, de granda unuiĝo kaj revolucia triflanka kombiniĝo, de purigo de la klasaj vicoj kaj reordigo de la partiaj organizoj. Tio kaŭzis malkontenton de la vastaj amasoj. La realaj faktoj montras al ni, ke en tiaj cirkonstancoj,

*La ĉefurba laborista propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong en Kinghua-universitato kaj batalantoj de PLA varme aklamas la publikigon de la grava artikolo de kamarado Jaŭ Venjuan La Laborista Klaso Nepre Devas Gvidi Ĉion. Ili decidis konduki bone la batalon, kritikon kaj reformon en la universitato, prenante la penson de Maŭ Zedong kiel la orientilon.*



# 善部战略伟大主席毛眼紧



*La reprezentantoj de la ĉefurba laborista propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong en Kinghua-universitato decidis pli bone kreive studi kaj apliki la penson de Maŭ Zedong, partopreni la tutan taskon de la batalo, kritiko kaj reformo en la universitato kaj por ĉiam gvidi lernejon.*

estas ne eble por la lernantoj kaj intelektuloj plenumi sole per si mem la taskon de batalo, kritiko kaj reformo kaj serion da aliaj taskoj sur la eduka fronto; estas necesaj la partopreno de la laboristoj kaj batalantoj de PLA kaj la forta gvidado de la laborista klaso.

Lastatempe Prezidanto Maŭ montris: “En la efektivigo de la proletara revolucio en eduko, necesas havi la gvidadon de la laborista klaso kaj la partoprenon de la laboristaj amasoj kiuj, en kunlaborado de la batalantoj de la Liberiga Armeo, efektivigos revolucion triflankan kombiniĝon kune kun la aktivuloj inter la lernantoj, instruistoj kaj laboristoj en la lernejoj, kiuj decidis konduki la proletaran revolucion en eduko ĝis la fino. La laboristaj propagandaj taĉmentoj devas longdaŭre resti en la lernejoj, partopreni la plenumon de ĉiuj taskoj de batalo, kritiko kaj reformo en la lernejoj, kaj por ĉiam gvidi la lernejojn. En la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkampanoj

**kaj malsuperaj mezkampanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso.”**

Tiu ĉi instrukcio de Prezidanto Maŭ montras la direkton kaj vojon por la eduka revolucio en la lernejoj; ĝi estas akra armilo por komplete frakasi la burĝaran edukan sistemon. La vastaj amasoj de junaj lernantoj devas varme bonvenigi la okupadon de la lernejaj batalpozicioj fare de la laborista klaso, ĝian partoprenon en batalo, kritiko kaj reformo kaj ĝian porĉiaman gvidadon de la lernejoj.

La laborista klaso posedas riĉan praktikan sperton en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. La laborista klaso plej malamas ĉiujn kontraŭrevoluciajn vortojn kaj agojn oponantajn socialismon kaj la penson de Maŭ Zedong kaj plej malamas la malnovan edukan sistemon servantan al la ekspluataj klasoj. Ĝi plej oponas la agojn de iuj intelektuloj, damaĝantajn ŝtatan havaĵon kaj obstrukantajn

batalon, kritikon kaj reformon. Ĝi plej abomenas la kutimon de malplena parolado kaj la stilon de duvizaĝulo: ago ne akordiĝas kun parolo. Tial, en kombiniĝo kun la batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo — la ĉefa kolono de la diktaturo de la proletaro — la amasoj de la laborista klaso povas plej forte haltigi ĉiujn erarajn tendencojn kontraŭajn al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj plej efike solvi ĉiujn tiel nomatajn “malnovajn, grandajn kaj malfacilajn” problemojn. Kontraŭdiroj nesolveblaj en senfina disputado inter la intelektuloj estas rapide solvitaj post la alveno de laboristoj. La kontraŭrevoluciaj vizaĝoj de plenmano da fiuloj, kiuj kaŝis sin post kulisoj kaj incitis la amasojn interbatali unu kontraŭ alia, povas esti komplete malkovritaj nur sub la interveno de laboristoj kaj batalantoj de la Liberiga Armeo.

“Sufiĉas por la laboristoj administri nur fabrikojn.” Tio estas kontraŭmarksisma vidpunkto. La laborista klaso komprenas, ke ĝi povas fine emancipi sin nur liberiginte la tutan homaron. Sen ĝisfunda plenumo de la proletara revolucio en eduko en la lernejoj, sen elradiko de reviziismo, la laborista klaso ne povas akiri sian finan emancipiĝon kaj ankoraŭ ekzistos la danĝero de kapitalisma restaŭro kaj la danĝero esti denove ekspluatata kaj subpremata. Aktive partopreni la grandan kulturalan revolucion en ĉiuj sferoj kaj certigi ke la penso de Maŭ Zedong okupu ĉiujn frontojn de kulturo kaj eduko, estas la devo, kiun la politike konscia laborista klaso devas preni sur sin.

“Ni volas nin liberigi mem kaj ne bezonas la partoprenon de la laboristoj eksterlernejaj.” Kio estas preparolata en la *16-Punkta Decido* de CK KPĈ, estas “liberigo de la amasoj per si mem”. Ĉu la laboristoj ne estas enkalkulitaj inter la “amasoj”? Ĉu la laborista klaso ne estas inter la “si”? Ĉiuj veraj proletaraj revoluciuloj, sed ne la sinŝajnigantaj nur per belaj vortoj, rigardas la laboristan klason kiel “sian” kaj kiel la plej avangardan kaj la politike plej konscian parton de la popolamasoj. La triflanka kombiniĝo de laboristoj, batalantoj de PLA kaj la revoluciaj aktivuloj en la lernejoj estas la plej fidinda garantio por la libe-

rigo de la amasoj per si mem. Kiu rigardas la laboristojn kiel forton fremdan al “si”, se li ne estas kapon perdinta, mem estas elemento fremda al la laborista klaso, kaj tiu lasta havas kaŭzon por praktiki diktaturon super li. Iuj intelektuloj, mem proklamintaj sin “proletaraj revoluciuloj”, tuj komencas oponi kontraŭ la laboristoj, kiam la laborista klaso ektaŭsas la interesojn de ilia malgranda “sendependa regno”. En Ĉinio ne malmultaj estas ankoraŭ personoj, similaj al Je-gong (kiu, kiel la legendo rakontas, amegis drakojn, sed terurigis kiam vera drako lin vizitis). Tiaj personoj estas tiuj, kiuj, kiel konate, malestimas la laboristojn kaj kamparanojn, emas al arogantaj manieroj, pretendas esti supermezure eminentaj, sed fakte estas nur modernaj Je-gongoj. La laboristoj kaj la batalantoj de la Liberiga Armeo devas iri en ĉiujn tiujn lokojn, lernejojn aŭ aliajn unuojn, kie amasiĝis intelektuloj, por disrompi la kompletan dominadon de intelektuloj, okupi tiujn grandajn aŭ malgrandajn “sendependajn regnojn”, kaj konkeri la lokojn kie nestas la pledantoj de la teorio de “multaj centroj”, t. e. de “neniu centro”. Tiamaniere, la nesanaĵa atmosfero, stilo kaj pensmaniero ekzistantaj inter la intelektuloj koncentritaj en amasoj povas esti ŝanĝitaj, kaj la intelektuloj mem povas esti remulditaj kaj liberigitaj.


“La laboristoj ne komprenas edukadon,” tiel diras iuj t. n. “altrangaj intelektuloj”. Reprenu viajn abomenindajn manierojn de burĝaraj intelektuloj! Estas du specoj de edukado: la burĝara kaj la proletara. Tio, kion vi “komprenas”, estas la pseŭdo- “scio” de la burĝaro: kiuj instruas sciencan kaj inĝenierarton, ne scipovas funkciigi aŭ ripari maŝinojn; kiuj instruas literaturon, ne scipovas skribi artikolojn; kiuj instruas agrokulturalan ĥemion, ne scipovas sterki kampojn. Ĉu ne troviĝas ĉie tiaj ridindaĵoj? La proletara eduka sistemo karakterizata per unueco inter teorio kaj praktiko povas esti kreita, paŝo post paŝo, nur sub la rekta partopreno de la proletaro. En tio vi scias nenion.

“La laboristoj ne konas la situacion en la lernejoj, nek la historion de la batalo inter la du linioj.” Ne maltrankviliĝu, kamaradoj. Ĉion ĉi tion la laboristoj ekkonos. Kompare

kun tiuj intelektuloj, kiuj havas malvastan vidkampon limigitan nur en sia malgranda montfortreso, la laborista klaso ja staras, neniu scias kiom, multe pli alte. Ili ne venas por resti tri aŭ kvin tagojn, sed daŭre laboros tie, okupos kaj gvidos la lernejojn por ĉiam. Ĉio objektive ekzistanta estas konebla. Pere de sia revolucia praktikado, la laborista klaso pli profunde konos la mondon kaj transformos ĝin laŭ sia propra fizionomio.

La laboristaj propagandaj taĉmentoj devas sisteme kaj laŭplane iri al altaj, mezaj kaj elementaj lernejoj, al ĉiuj kampoj de la superstrukturo, al ĉiuj unuoj, kie ankoraŭ ne estas bone efektivigitaj la batalo, kritiko kaj reformo, por, prenante la penson de Maŭ Zedong kiel orientilon, unuiĝi kun kaj helpi tie al la aktivuloj, kiuj decidis konduki la proletaran revolucion en eduko ĝis la fino, unuiĝi kun la plejparto de la amasoj, inkluzive la remuldeblajn intelektulojn, kaj akceli, en la proletara spirito de ĝisfunda revolucio, la batalon, kritikon kaj reformon tie. Tio ĉi estas granda historia misio de la laborista klaso de Ĉinio en la nuna tempo. Dum la

*Laboristoj de la kantona laborista propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong en la Medicina Instituto "Ĝongŝan" studas vortojn de Prezidanto Maŭ kune kun junaj ruĝgardianoj.*



plenumado de tiu ĉi misio, la laborista klaso mem ricevos profundan hardon en la klasa batalo, emerĝos nombro da elstaraj laboristoj-kadroj, ne nur por administri la lernejojn, sed ankaŭ por plifortigi ĉiujn flankojn de la ŝtataj organoj kaj la revoluciajn komitatojn en diversaj niveloj.

Por plenumi tiun ĉi historian taskon, la laborista klaso devas bone studi la penson de Maŭ Zedong serioze, lerni la amasan linion kaj stilon de enketo kaj esploro, kiel konstante instruas Prezidanto Maŭ, senĉese levi sian politikan konscion, plifortigi sian revolucion disciplinitecon kaj konstante kritiki la korodon kaj influon de diversaj putraj manieroj de la burĝaro interne de la laborista klaso. La burĝaro havas siajn tradiciajn influojn en la kulturaj kaj edukaj unuoj. Kiam la laborista klaso transformas la mondon per la mondkoncepto de la proletaro, t. e. per la penso de Maŭ Zedong, la burĝaro ĉiam klopodas uzi sian burĝaran mondkoncepton por korodi la malfortajn partojn de la laboristaj vicoj inkluzive tiujn de la gvidaj kadroj de la lasta. Kontraŭ tio oni devas havi altan singardemon. Estas

necese teni firman starpunkton de la proletaro kaj singardi kontraŭ la atakoj de sukertegitaj obusoj aŭ aliformaj rimedoj direktataj al la laboristaj vicoj. Oni devas kun seriozeco ankaŭ plenumi bone la laboron de purigo de la klasaj vicoj, teni revolucion kaj stimuli produkton, konduki bone la batalon, kritikon kaj reformon en fabrikoj kaj aliaj entreprenoj.

Lastatempe Prezidanto Maŭ montris: **“La batalo, kritiko kaj reformo en fabriko ĝenerale trapasas jenajn etapojn: fondo de revolucia komitato de triflanka kombiniĝo, amasa kritikado, purigo de la klasaj vicoj, reordigo de la partiaj organizoj, elitigo kaj simpligo de la organiza strukturo, ŝanĝo de neraciaj reguloj kaj sistemoj kaj sendo de personoj laborantaj en oficejoj al bazaj unuoj.”**

Tiuj vortoj de Prezidanto Maŭ estas resumo de la disvolviĝado de la amasa movado en la etapo de batalo, kritiko

kaj reformo, kaj montras al ni klaran vojon por plenumi la taskojn de batalo, kritiko kaj reformo en fabrikoj kaj aliaj entreprenoj.

La unua tasko estas fondi la revolucionan komitaton de triflanka kombiniĝo por ke la gvidado de fabrikoj kaj aliaj entreprenoj troviĝu vere en la manoj de la proletaro. Tio ĉi, ofte, estas farata lige kun la taskoj de amasa kritiko kaj purigo, en ĝeneralo, de klasaj vicoj.

Revolucia amasa kritiko ebligas al ni elimini la venenajn influojn de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en diversaj lokoj kaj levi la konscion pri batalo inter la du linioj, pavimas, politike kaj ideologie, la vojon al purigo de la klasaj vicoj, kaj, dum la purigado de la klasaj vicoj, ludas rolon en mobilizado de la amasoj kaj plifirmigo de la atingoj en la batalo. Purigi la klasajn vicojn kaj bati certe, senerare kaj senkompate la plenmanon da spionoj, renegatoj, nekuraceblaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj neremulditaj bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj, dekstruloj, estas tre grava laboro por la laborista klaso en la efektivigado de la diktaturo de la proletaro super la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluatitaj klasoj, la purigado de siaj propraj vicoj kaj la eliminado de la klasaj malamiko enŝteliĝintaj en la internon de la laborista klaso. Ĝi provizas la amasan kritikon per viva, aktuala materialo. La amasa kritiko kaj la purigado de la klasaj vicoj akcelas kaj antaŭenpuŝas unu la alian. Ambaŭ ili kreas la plej bonajn kondiĉojn por la reordigo de la partiaj organizoj. Post la severa provado de klasa batalo en politiko, ideologio kaj organizo, la vastaj amasoj de partianoj multe levis sian politikan konscion kaj multe plibonigis siajn rilatojn kun la amasoj; la ekstreme malmultaj fiuloj en la Partio estas eliminitaj; estas jam klara la stato de la partianoj en politiko kaj organizo; nombro da aktivuloj emergintaj en la movado estas akceptita en la Partion, tiel ke al ĝi estas enigita freŝa sango; kaj iom post iom formiĝas gvidanta kerno, kiu firme efektivigas la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Dank' al tio ni povos bone reordigi partiajn organizojn kaj realigi la grandan celon montritan de Prezidanto Maŭ por la reordigo de la partiaj organizoj: **“La**

**partiaj organizoj devas esti fornitaj el la progresemaj elementoj de la proletaro; ili devas esti viglaj avangardaj organizoj kapablaj gvidi la proletaron kaj la revolucionajn amasojn por batali kontraŭ la klasa malamiko.”**

Tiel estas por la movado en industria kaj minaj entreprenoj, kaj, ĝenerale, estas same tiel ankaŭ por la movado en kulturaj kaj edukaj institucioj kaj en la partiaj kaj registaraj organoj.

La alttajo en revolucio akcelas la alttajdon en produkto. Dank' al la penado de centoj da milionoj da malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, en la agrikultura produkto de nia lando, riĉaj rikoltoj estas akiritaj en nombro da jaroj. Nur kun fortika socialisma batalpozicio en la kamparo estas eble por la granda proletara kultura revolucio en la urboj akiri unu venkon post alia. Ni salutas al la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj — la firma aliancano de la laborista klaso. Kun la profunda disvolviĝo de la batalo, kritiko kaj reformo, ankaŭ sur la industria fronto emerĝas multaj novaj aferoj; en nemalmultaj lokoj jam aperis vigla teknika revolucio dum la procezo de reformo. La situacio estas bonega kaj entuziasmiga, dum la plenmano da klasaj malamikoj, kiuj vane provis efektiviĝi restaŭron, trafis kompletan bankroton. Nun la tagoj iras tre malfacile por la usona imperiismo, sovetunia reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj en la mondo; ili vundiĝis de kontuzoj kaj batiĝoj, kaj falis en dissplititecon kaj senlirejon. Dume, sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong, nia granda socialisma patrolando hardita en la granda proletara kultura revolucio, pompe prosperas kaj vidas antaŭ si senlime luman perspektivon. Ni devas klopodi nepre sekvi proksime la disvolviĝantan situacion, plene mobilizi la amasojn, ĝustatempe resumi sperton, bone fari enketon kaj esploron, bone labori super tipaj ekzemploj, ellabori planojn laŭ plena amplekso, plifortigi la gvidadon, kaj serioze klopodi por konduki bone la kampanjon de la batalo, kritiko kaj reformo. Tio ĉi estas batalo en nia strebado al plenampleksa venko de la granda proletara kultura revolucio. Ni strikte sekvu la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ kaj marŝu antaŭen de venko al venko!



*La ĉefurba laborista propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong en Kinghua-universitato kaj tieaj studentoj, instruistoj kaj laboristoj kune okazigas mitingon kaj demonstracion kaj varme aklamas la plenan ruĝigon de la tuta lando kaj la grandan venkon de la proletara kultura revolucio.*

# *Nova Fizionomio de Kinghua-Universitato*

— Post la alveno de la laborista propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong



**F**RUUA mateno. La suno verŝas oran lumon sur la ĝardenon de Kinghua-Universitato kvazaŭ kovrante ĝin per brokato. Kaj la melodio de *Ruĝas la Oriento* ŝvebas en la matena aero.

Sur sportejoj kaj sub la ombroj de arboj, multaj diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ en vicoj aŭ rondoj. La freŝe ruĝaj tabuloj kun eldiroj de Prezidanto Maŭ staras tie kaj ĉi tie seninterrompe kiel vojon montrantaj lampoj, gvidante homojn brave antaŭen!

Nelonge post kiam la laborista propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong formita el industriaj laboristoj de la ĉefurbo venis al la universitato en imponaj kolonoj, alportantaj la printempan venton de la penso de Maŭ Zedong, tre kuraĝigaj ŝanĝoj jam okazis en ĝi.

### LA LABORISTOJ DE LA UNIVERSITATO FARIĜIS ĜIAJ MASTROJ

Post la alveno al la universitato, la laborista propaganda trupo tuj helpis la tieajn laboristojn mastri la universitaton. En la pasinteco, sub la regado de reviziismo, la laboristoj de la malnova Kinghua ne havis indan pozicion en politiko kaj suferis diferencigon en ekonomio. Sed nun, la labo-

ristoj gvidas asistantojn kaj lektorojn en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Kaj ili komplete renversis la historion de la universitato inversigitan de la burĝaro.

Post kiam Prezidanto Maŭ faris la instrukcion ke “estas necese plene disvolvi la gvidan rolon de la laborista klaso en la granda kultura revolucio kaj ĉiuj laboroj”, la pli ol sepdek instruistoj, oficistoj kaj laboristoj de la fakultato de agromekaniko serioze studis ĝin por akiri profundan komprenon pri ĝi kaj tuj elektis kvin maljunajn laboristojn por gvidi ilin en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Tre granda estas la fervoro de la maljunaj laboristoj en gvidado de la studa kurso! Ili laboras tage kaj vespere, kaj iutempe ili hejmen revenas eĉ en profunda nokto pro okupiteco. La maljunaj laboristoj Sun Jaŭ kaj Ĝu Denke ambaŭ transloĝiĝis en la universitaton por bone gvidi la kurson.

Ĉiunokte, sub elektra lampo, iuj maljunaj laboristoj kun presbiopaj okulvitroj absorbite studas verkojn de Prezidanto Maŭ aŭ serioze diskutas pri studotaĵo por la morgaŭa tago.

Sub la gvidado de la laboristoj, bone iras la studa kurso de la penso de Maŭ Zedong de la

*Sub la helpo de la kamaradoj de la laborista propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong, la laboristoj de la sinteza meĥanika fabriko de Kinghua-universitato aranĝis kurson de la penso de Maŭ Zedong kaj efektive gvidas instrukcion de Prezidanto Maŭ.*



nomita fakultato. La maljunaj laboristoj la unuaj edife batalis kontraŭ egoismo kaj kritikis reviziismon, kaj ĉiam donas ekzemplon por konduki la aliajn antaŭen.

### NENIAM FORGESU: MI ESTAS FILO DE SKLAVO

La alveno de la laborista propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong al Kinghua-Universitato alportis novan grandan kuraĝigon al multaj aktivuloj, kiuj volas nepre konduki la proletaran edukan revolucion ĝis la fino. Apartan emocion spertis la tibeta studento Daba. Aŭskultante la rakontadon de la laboristoj pri siaj familiaj historioj plenaj de sango kaj larmoj, li nedeteneble ekpensis pri sia malfeliĉa pasinteco, kaj plurfoje larmis de emocio antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ. Daba, filo de sklavo de pluraj generacioj, fariĝis sklavo de sia mastro jam ekde sia naskiĝo. Liaj malorde vicigitaj dentoj atestas klasan maljustaĵon. Estas Prezidanto Maŭ kiu savis lin kaj ankaŭ faris lin, sklavon, studento. Ĉiam kiam li ekpensas pri tio, en lia koro ekŝvelas neesprimebla profunda amsento al Prezidanto Maŭ. Por defendi Prezidanton Maŭ, li pretas oferi ĉion de si.

Sed, la malnova eduka sistemo kaj la de burĝaraj intelektuloj regita malnova Kinghua subpremilo kaj katenilo liajn membrojn. Li multfoje demandis al si: Kial Lej Feng, Vang Gie kaj Oŭjang Haj aperis nur en la armeo? Pro kio ne troviĝas tiaj herooj en lernejoj? Al tiuj demandoj li ne povis trovi respondojn.

Dum la granda kultura revolucio, Daba brave batalis por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Sed, por ŝanĝi plie la fizionomion de la universitato kaj konduki la edukan revolucion ĝis la fino, li ne scias kien direkti sian forton kaj ne havas sufiĉan fidon.

La laborista propaganda trupo, kiun alsendis Prezidanto Maŭ, portas al Kinghua-Universitato printempan tondron por eduka revolucio. Kaj la edukado donita de la laborista klaso rapide altigis la klasan konscion de Daba. Li diris ekscitite: "Nun troviĝas espero por Kinghua-Universitato! Sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong kaj kun la laborista klaso kiel potenctenanto por ni, ni povas venki ĉiujn plej grandajn malfacilojn kaj certe sukcesos konduki la edukan revolucion ĝis la fino." Sub la gvido de la propaganda trupo, Daba la unua batalis kontraŭ egoismo kaj kritikis reviziismon en la kurso. Cetere



*La tibeta studento Daba interŝanĝas komprenon el la studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kune kun la kamaradoj de la ĉefurba laborista propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong.*

li ofte intime interŝanĝas pensojn kun siaj kamaradoj kaj aktive helpas la laboristan propagandan trupon de la penso de Maŭ Zedong en ideologia kaj politika laboro.

### PROFUNDA EDUKO

En la pasinteco, iuj rigardis Kinghua-Universitaton kiel "lulilon de inĝenieroj" kaj raviĝis de la titoloj de "specialisto" kaj "inĝeniero". Por ĝisfunde elimini tiujn burĝarajn venenajn influojn kaj altigi la politikan konscion de la instruistoj kaj studentoj per la penso de Maŭ Zedong, la laborista propaganda trupo de la penso de Maŭ Zedong organizis vizitojn al fabrikoj por la instruistoj kaj studentoj. Iutage, 136 instruistoj kaj studentoj de la metalurgia fakultato venis al Unua Ĝenerala Maŝina Fabriko de Pekino. Antaŭ unu nove fabrikita "spilmaŝino", laboristoj diris, ke tiun ĉi maŝinon ne sukcesis fari la burĝara reakcia teknika "aŭtoritato", helpa ĝenerala inĝeniero de la fabriko dum du jaroj, elspezinte pli ol ok mil juanojn. Sed, post la fondiĝo de la revolucia komitato, utiligante uzitajn materialojn kaj elspezinte malmultan monon, la laboristoj ĝin fabrikis nur en dudek tagoj. Ĉiuj novaj kreaĵoj kaj renovigoj faritaj de la laboristoj igis la instruistojn kaj studentojn pli bone kompreni la veron, ke la laborista klaso kreas ĉion kaj estas plej multscia kaj plej saĝa.

En ĉeloka kritika kunveno, ili ricevis pli grandan edukon. Montrante iun instrumenton kun stranga formo, iu laboristo demandis al la reakcia "aŭtoritato": "Jen la instrumento por kontrolado, kiun vi projektis. Respondu: Kiel oni uzu tiun monstran ilon, tiom pezan?" Tiam tiu provis ĝin levi, li ne povis eĉ ĝin movi. Tiam la laboristo facile levis nur per unu mano la samcelan instrumenton, kiun li mem faris. La laboristoj indigne akuzis la reakciajn burĝarajn teknikajn "aŭtoritatojn", kiuj kutimas fari ĉaron en fermita ĉambro, ne kombiniĝante kun la laboristoj. Ili ne nur ne povis fari iajn novajn kreaĵojn mem, sed eĉ per ĉiuj rimedoj batis kaj subpremis la laboristojn, kiuj klopodis ion krei aŭ inventi. Ni laboristoj firme renversas kaj senkreditigas kritike la reakciajn burĝarajn teknikajn "aŭtoritatojn" per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kaj varme bonvenigas revoluciajn intelektulojn, kiuj vere volentas kombiniĝi kun laboristoj.

El la amasa kritikado de tiu fabriko, la instruistoj kaj studentoj ricevis profundan edukon, kaj ili pli firme iras sian vojon de kombiniĝo kun la laboristoj kaj kamparanoj.

## KURANTAJ AFEROJ

### ABUNDA RIKOLTO DE FRUA KAJ MEZA RIZOJ EN FUGIAN, GIANGHI KAJ ALIAJ PROVINCOJ

Sub la kondukado de la granda direktivo de Prezidanto Maŭ "teni la revolucion kaj stimuli la produkton", abundan rikolton de frua rizo akiris diverslokaj popolaj komunumoj en Fugian-provinco. En suda Fugian, la ĉefa produktregiono de frua rizo de la provinco, nemalmultaj komunumoj kaj brigadoj en Longhaj, Ĝangĝoŭ, Junhiaŭ kaj aliaj gubernioj eĉ akiris eksterordinare grandan riĉrikolton.

En la ĝojigaj tagoj de abunda rikolto, la vasta membraro de popolaj komunumoj levis altan tajdon de rapida livero, livero de bonkvalita greno kaj en granda kvanto al la ŝtato. Nemalmultaj popolaj komunumoj kaj brigadoj en la antaŭurboj de Fuĝoŭ kaj Ĝangĝoŭ plenumis la grenliveran taskon difinitan de la ŝtato jam en tiu sezono.

Post akiro de abunda rikolto de la ĉijaraj frua kaj meza rizo, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Gianghi-provinco vendis someran grenon kaj liveris imposton al la ŝtato kun granda fervoro. Ĝis nun, la nove rikoltita greno akceptita en la ŝtatajn tenejojn pliiĝis 1.5-oble kompare kun tiu de la sama periodo en la pasinta jaro. La rapideco de livero kaj kvalito de la greno liverita al la ŝtato estas senprecedencaj.

Venkinte la katastrofojn de inundeco kaj sekeco, ankaŭ la provincoj Hubej kaj Hunan akiris grandan riĉrikolton de meza rizo. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj nun rapide sunumas la rikoltaĵon por vendi la plej bonkvalitan rizon al la ŝtato.

# La Ĉefforto por Reformi la Malnovan Mondon

— Pri la laboristaro de Santiaŭŝi en la granda kultura revolucio

**E**N la senprecedenca granda proletara kultura revolucio de nia lando, la ĉina laboristaro kun senlima fideleco al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ plene ludas sian rolon de gvidanto kaj ĉefforto, komandas, kritikis kaj reformas ĉion per la penso de Maŭ Zedong, senĉese akirante novajn venkojn por la granda kultura revolucio.

Ni prezentos sube al la legantoj, kiel la revoluciaj laboristoj de la industria kvartalo Santiaŭŝi de Tiangin ludas la rolon de la ĉefforto en la granda proletara kultura revolucio.

## FIRME SEKVI PREZIDANTON MAŬ JE ĈIU PAŜO

En la malnova socio, la laboristaro de Santiaŭŝi suferis ĉiajn kruelajn subpremojn kaj ekspluatojn de imperiismo, burĝaro kaj feŭdaj fortoj. Alta estas ilia klaskonscio, firma estas ilia starpunkto kaj forta estas ilia revolucia bataleco. En la granda kultura revolucio, la laboristoj disvolvas sian gloran revolucionan tradicion, persiste tenas la penson de Maŭ Zedong en komandanteco kaj kondukadas la revolucion strikte sekvante Prezidanton Maŭ.

En aŭgusto de 1966, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ publikigis sian dazibaŭon de granda

historia signifo *Bombardu la Ĉefkomandojn* kaj la laboristoj de ĉiuj fabrikoj de Santiaŭŝi tuj leviĝis en ribelo kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, trarompante la barojn kaj obstaklojn starigitajn de la burĝara reakcia linio, alte tenante la grandan standardon **“estas prave ribeli kontraŭ la reakciularo”**. En januaro de 1967, la tieaj proletaraj revoluciuloj jam reprenis al si ĉiujn potencojn uzurpitajn de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

En septembro de 1967, Prezidanto Maŭ publikigis sian instrukcion: **“Interne de la laborista klaso ne ekzistas konflikto en fundamentaj interesoj. Sub la diktaturo de la proletaro, la laborista klaso des pli ne havas kaŭzon por definitive splitiĝi en du grandajn antagonismajn organizojn.”** Informiĝinte pri tiu plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ en profunda nokto, la propaganda taĉmento de veteranaj laboristoj kaj la PLA-anoj komisiitaj por subteni la maldekstrulojn de Santiaŭŝi tuj ĝin komunikis al ĉiuj fabrikoj en plej alta rapideco, kaj en tri tagoj revolucia granda unuiĝo jam efektiviĝis en ĉiuj fabrikoj de tiu kvartalo laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ.

Kiam Prezidanto Maŭ donis la grandan instrukcion **“Bona estas la revolucia komitato”**,



*Veteranaj laboristoj de Santiaŭŝi en la Tiangina Laborista Propaganda Taĉmento de la Penso de Maŭ Zedong, kiu laboras en la Tiangina Politeknika Kolegio, serioze studas la gravajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri la proletara eduka revolucio. Ili firme decidis bone konduki edukon revolucion en la lernejo kun la penso de Maŭ Zedong kiel sia oriento kaj gvidadi la lernejon por ĉiam.*

la laboristoj de Santiaŭŝi tuj serioze studis kaj decideme klopodis por efektivi tiun plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ. Ĉiuj fabrikoj rapide fondis en si revolucion komitaton. Tute ruĝa fariĝis tiu kvartalo plej frue en Tiangin.

“Sekvante Prezidanton Maŭ, la laboristoj emancipiĝos; sekvante Prezidanton Maŭ, la tuta mondo ruĝiĝos!” En la granda proletara kultura revolucio, la laboristoj de Santiaŭŝi ĉiam senŝanceliĝe aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj brave defendas la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.

Ĉiuj en Santiaŭŝi konas la historion pri la maljuna laboristo Liu Kjuanfu de la Fabriko de Aluminaĵoj, kiu, gvidante revolucion amasojn, ribelis kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Liu Kjuanfu naskiĝis en la familio de malriĉa kamparano, fariĝis knabolaboristo en fabriko, kiam li estis tre juna, kaj multege suferis de la subpremado kaj ekspluatado fare de kapitalistoj. Li havas ĝisos-

tan malamon kontraŭ la kapitalistoj kaj iliaj lakeoj, kiuj suĉadis la sangon de la laboristoj. Sed antaŭ la granda kultura revolucio, sub la regado de la reviziisma linio praktikata de la ĉina Ĥruŝĉov, nombro da kapitalistoj kaj postrestantaj elementoj de Kuomintang uzurpis la gvidajn postenojn de la fabriko kaj ĉiumaniere klopodis konduki la fabrikon sur la malĝustan vojon kapitalisman. Tion rimarkinte, Liu Kjuanfu arde deziris faligi ilin ĉiujn. Kiel tondro en serena ĉielo, potencege disvolviĝis la granda kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ. Liu Kjuanfu tuj skribis dazibaŭojn, aranĝis batalajn kunvenojn kune kun aliaj laboristoj kaj lanĉis furiozan atakon kontraŭ la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Post ripetada luktado, ili fine reprenis la gvidan potencon de la fabriko uzurpitan de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj gvidis la revolucion amasojn batalakiri senĉese venkojn tiel en revolucio kiel en produktado.



*Montrante siajn manojn, la maljuna laboristo Vang Fujuan indigne kondamnas la krimagojn de la kapitalistoj, kiuj kruele ekspluatis la laboristojn, kaj tiujn de la ĉina Ĥruŝĉov enrestaŭro de kapitalismo.*

## ENERGIE KONDUKI REVOLUCIAN AMASAN KRITIKON

La laboristaro de Santiaŭŝi estas la ĉefforto en la revolucia amasa kritiko. La tieaj veteranaj laboristoj, kiuj multege suferis en kaj havas grandan malamon kontraŭ la malnova socio, organizis fortan propagandan taĉmenton de la penso de Maŭ Zedong kaj ĉiam staras ĉe la frontaj vicoj de klasbatalo. Ili iris al fabrikoj kaj vilaĝoj, al lernejoj kaj institucioj, al la loko, kie klasbatalo plej intensas. En malpli ol unu jaro, ili faris kritikajn paroladojn antaŭ pli ol kvincent mil personoj en pli ol mil unuoj. Per siaj persone spertitaj suferoj, ili akuzis la kapitalistojn pri iliaj subpremado kaj ekspluatado en la malnova socio, kaj malkaŝis kaj kritikis la ĝisĉielajn krimojn de la ĉina Ĥruŝĉov en restaŭro de kapitalismo. Ili diris: “En la malnova socio, enirinte Santiaŭŝi, ni laboristoj vivis kvazaŭ en infero, nutris nin per manĝo por poroj kaj hundoj kaj faris laborojn de ŝarĝbrutoj; vipado kaj bastonado rompis al ni la spinon kaj ostojn; nia sango ruĝigis Santiaŭŝi kaj malamo gravuriĝis en nian koron!” Sed la ĉina Ĥruŝĉov inversigis pravon kaj malpravon dirante, ke “ekspluato estas merito”; la grandaj kaj malgrandaj kapitalistoj kaj postrestantaj elementoj de la kuomintanga reakciularo, kiuj uzurpis la gvidantecon de la fabriko, ankoraŭ ĉiam revis restaŭron de la malnova reĝimo kaj la ĉina Ĥruŝĉov plenforte trumpetis pri “estingiĝo de klasbatalo”. La ĉina

Ĥruŝĉov estas la enpartia agento de la kapitalistoj. La laboristaro nepre senkreditigos kritike liajn kontraŭrevoluciajn absurdajn asertojn kaj lin faligos per la penso de Maŭ Zedong. Ĉie, kien la laboristoj iras, ili plivigliĝas la fajron de la revolucia amasa kritiko.

La 63-jara maljuna laboristo Vang Fujuan, kiu plej frue partoprenis la propagandan taĉmenton, eklaboris en iu fabriko de Santiaŭŝi jam en la aĝo de nur dekkelkaj jaroj. Kiam la kapitalisto aĉetis novan maŝinon kaj timis ke aliaj ellernu la teknikon, li ŝlisis la maŝinon kune kun Vang Fujuan en malhela ĉambreto kaj devigis lin tie labori eĉ ne lasante lin eliri al necesejo. En tiuj mallumaj tagoj, Vang Fujuan multon suferis, kaj antaŭ ol forpasis sep jaroj, naŭ el liaj dek fingroj jam estis formorditaj, unu post alia, de la maŝino. Fine la kapitalisto eĉ forpelis lin el la fabriko.

Kiam Vang Fujuan ekpartoprenis la propagandan taĉmenton, oni diris al li: “Vi estas grandaĝa kaj la kruroj ne estas tiel facilmovaj, prefere ripozu hejme.” Sed la maljunulo diris firme: “Multe mi suferis kaj granda estas mia malamo kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov. Mi nepre partoprenos la propagandan taĉmenton kaj kritikos la ĉinan Ĥruŝĉov.” Vang Fujuan vizitis ne nur ĉiujn fabrikojn en Santiaŭŝi sed ankaŭ iris al fabrikoj, lernejoj kaj popolaj komunumoj en malproksimeco de centoj da lioj por propagandi la penson de Maŭ Zedong, kaj estas unu el la plej aktivaj membroj de la taĉmento. En ĉiuj kritikaj mitingoj li indigne kondamnis kun

larmoj la ĝisĉielajn krimegojn de la ĉina Ĥruŝĉov pri restaŭro de kapitalismo, elmontrante siajn manojn, al kiuj mankas naŭ el la dek fingroj. Tiu elokventa atesto plene flamigis la indignon de la revoluciaj amasoj. Ĉiuj laboristoj, komunumanoj, revoluciaj kadroj kaj junaj ruĝaj gvardianoj, kiuj aŭskultis la raporton de la maljunulo, esprimis firme, ke ili absolute ne permesos revenon de la suferplenaj tagoj de la malnova socio, kaj absolute ne permesos efektivigon de la intrigo de la ĉina Ĥruŝĉov pri restaŭro de kapitalismo!

Sub la gvidado kaj inspirado per ekzemplodono de la laboristaro, la vastaj revoluciaj amasoj de Santiaŭŝi organizis centon da batalgrupoj. De la fabrikoj ĝis la loĝkvartaloj, ĉie flamas la incendio de revolucia amasa kritiko kaj formiĝis giganta sieĝa ringo por ekstermi la ĉinan Ĥruŝĉov.

## MODELOJ EN TENADO DE LA REVOLUCIO KAJ STIMULADO DE LA PRODUKTO

Sub la direktado de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, la laboristaro de Santiaŭŝi montris senlimajn saĝon kaj talenton en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. Ili frakasis la diversajn intrigojn de la klasaj malamikoj por subfosi la grandan kulturen revolucion, tenas en siaj manoj

la potencon de revolucio kaj produktado de la fabrikoj kaj ĉiam irigas ilin plibone laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Kiam la incendio de la granda kultura revolucio ekbrulis, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la plej granda fabriko de aluminaĵoj en Tiangin ĵetis flanken la rekonstruan laboron de la fandejo kaj minacis la laboristojn dirante: "Vi volas renversi la tutan mondon kaj detruis la produktadon; vi devas respondeci pri ĉio ĉi tio!" Sed kun heroa sentimeco, la laboristoj respondis decideme: "Forpuŝinte vin obstaklojn, la socialisma rado ruliĝos nur pli rapide; sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong, la fabriko konstruiĝos ankoraŭ pli bone!" Ili ĝustatempe malkaŝis kaj frakasis la intrigon de tiuj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kaj elektis la fandiston Li Kinghaj por tenadi la potencon de direktado de la produkto.

Kvankam Li Kinghaj neniam vizitis lernejon en la malnova socio, li tamen havas ruĝan koron senlime fidelan al Prezidanto Maŭ. Li venis kun la laboristoj al la konstruejo de la fandejo kaj laŭte legis la eldiron de Prezidanto Maŭ: "**Ni bone scias ne nur detru la malnovan mondon, sed ankaŭ konstrui la novan.**" Stimulate de la granda instruo de Prezidanto Maŭ, la laboristoj mem eklaboris kaj rapide rekonstruis la fandejon. La produktado de la fabriko neniam ĉesis eĉ je unu sola tago,



*La veterana laboristo Ki Ĝenŝeng de la Vapormaŝina Fabriko de Santiaŭŝi donas lecionon pri klasbatalo al gejunuloj per rakontado de siaj propraj travivaĵoj.*

oni sukcese plenumis la produktan planon en ĉiu monato kaj en julio de la kuranta jaro ili eĉ kreis la plej altan rekordon de produkto en la historio de la fabriko.

Prezidanto Maŭ diris: **“Revolucio signifas liberigon de la produkta forto, kaj revolucio signifas akcelon de la disvolviĝo de la produkta forto.”** La laboristaro forĵetis la nekuraceblajn enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon kaj la reakciajn burĝarajn “specialistojn” kaj “aŭtoritatojn”, kaj rompinte la katenon de la reviziisma administra sistemo, la produkta forto plene liberiĝis.

Kelkaj laboristoj, havantaj klarecon nur de elementa lerneĵo, en la Fabriko de Akcesoraĵoj de Ilmaŝinoj sukcesis provprodukti la unuan reguligeblan altprecizan fiksigan ingon\* de nia lando, dank’ al kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Frue en la jaro 1964, ili jam komencis provfari tian produktajn, sed la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ĉiamaniere ilin malhelpis kaj subpremis, dirante: “Kion povas elfari tiuj kruduloj? Sufiĉas, ke oni kopiu la pretan modelon eksterlandan.” Kaj fine ili eĉ arbitre “malpermesis la provadon”. En la granda kultura revolucio, tiuj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estis faligitaj kaj tiuj laboristoj denove organiziĝis. Ili indigne kritikis la ĝisĉielan krimagon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj en la fabriko en distruptado pri sklavismo, rampismo kaj adorado al fremdlandaĵoj kaj kuraĝe faris provfaradon laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: **“Ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi paŝon post paŝo post la aliaj. Ni devas rompi la rutinojn kaj plejeble apliki progresintajn teknikojn.”** Kaj la laboristoj armitaj per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong povas krei ĉian miraklon de la mondo! En la sonado de la triumfa kanto pri batalakiro de la plenampleksa venko de la granda kultura revolucio, ili finfine sukcesis provprodukti reguligeblan altprecizan fiksigan ingon kun malpli granda korpo sed pli bona kvalito ol tiuj de fremdlandaj samspecaj produktaĵoj, kaj oni jam komencis ĝin fabriki pogrande.

Sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la laboristaro de Santiaŭŝi nun estas marŝanta de venko al venko per ankoraŭ pli bravaj paŝoj en la granda batalo por akiri la plenampleksan venkon de la granda proletara kultura revolucio!

\*Fiksiga ingo estas ilo por fikse teni prilaborajn, angle nomata “chuck”, ruse “патрон”.

## KURANTAJ AĜEROJ

### ĈINIO FABRIKIS SIAJN UNUAJN DIZEL-LOKOMOTIVOJN KUN STATIKHIDRAŬLIKA TRANSMISIO

Firme plenumante la grandan direktivon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion kaj stimuli la produktan”**, la vastaj revoluciaj laboristaj kaj oficistaj amasoj de la Ĝangĝou-a Dizel-lokomotiva Fabriko, Dalian-a Fabriko de Veturiloj por Fabrikoj kaj Minejoj, Ŝigiaĝuang-a Fabriko de Movfortaj Maŝinoj kaj aliaj mem projektis kaj sukcese fabrikis la unuajn dizel-lokomotivojn kun statikhidraŭlika transmisio. Tiel nia produkta tekniko de dizel-lokomotivoj por uzo en fabrikoj kaj minejoj leviĝis al la progresinta nivelo de la mondo.

La unuaj prove fabrikitaj dizel-lokomotivoj kun statikhidraŭlika transmisio konsistas el tri tipoj de 80, 120 kaj 160 ĉevalpovoj. Post certa tempo da prova funkciigo de tiuj lokomotivoj, oni faris koncentran ekspertizon kaj konstatis ke la tri tipoj de la nomitaj dizel-lokomotivoj ĉiuj atingis fundamente la teknikajn postulojn de la projekto en la ĉefaj kvalitoj.


La avantaĝoj de tiaj lokomotivoj estas: bona tirpovo, kompakta strukturo, simpla manipulado, vasta uzebleco, aparte en manovrado de vagonaroj kaj transportado en tuneloj. Tiaj lokomotivoj aldonas novajn tirfortojn al la mallongdistanca trafiko sur mallarĝa kaj norma trakoj de fervojo en nia lando.



# La Tuta Popolo Varme Aklamas la Plenan Ruĝiĝon de Nia Lando

La tibetaj diversnaciecaj revoluciaj amasoj jubilas la triumfan naskiĝon de la revoluciaj komitatoj de Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj de la urbo Lhasa.





La vastaj amasoj de armeanoj kaj popolanoj en Urumĉi varme festas la triumfan fondiĝon de la revoluciaj komitatoj de Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj de la urbo Urumĉi.



Dancante kaj kantante, oni celebras la plenan ruĝiĝon de la tuta lando.

La 5-an de septembro de 1968, samtempe naskiĝis en gloro la revoluciaj komitatoj de la aŭtonomaj regionoj de Tibeto kaj Hingiang! Tiu granda venko montras la plenan ruĝiĝon de la tuta lando, escepte de Tajvan-provinco! Tio ĉi estas granda venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj tre ĝojinda afero en la politika vivo de la sepcentmiliona popolo de nia lando!

Kun plena ĝojo de venko, portante grandajn portretojn de Prezidanto Maŭ kaj kun la ruĝa libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano, la revolucia popolo diversnacieca de la tuta lando okazigis solenajn celebrajn mitingojn respektive en siaj lokoj. Ili kriadis: Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio! Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ! Longe vivu!



Dancu, dancu kiel vi volas!

La ĉefurbaj armeanoj kaj popolanoj aklamas tra la tuta nokto sur la stratoj la plenan ruĝiĝon de la tuta lando.





Senfine longan vivon al Prezidanto Maŭ! senfine longan vivon!

# La Naturo de la Laborista Klaso

**E**L sub traktoro de la marko Ruĝas Oriento elrampis junulo kun vizaĝo plena je ŝvito kaj manoj olemakulitaj. Iu kamarado paŝis al li kaj lin demandis kun rideto: “Kial vi ankoraŭ tuŝas olemalpurajon?”

“Ankoraŭ! Mi tion faros por la tuta vivo. La naturo de la laborista klaso ja neniam devas ŝanĝiĝi!”

La dirita junulo estas neniu alia ol kamarado Ma Ĝenhua, laborista reprezentanto kaj la unua vicĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Dongming-gubernio, Ŝandong-provinco.

## I

En printempa tago de la kuranta jaro, la Revolucia Komitato de Dongming-gubernio, Ŝandong-provinco, venke naskiĝis en la klasbatala ŝtormo!

Tiutage, Ma Ĝenhua aparte ekscitiĝis kaj longe ne povis endormiĝi. Li malfermis la kvaran volumon de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj ripetade legis la jenon: “**Gajni la tutlandan venkon estas nur la unua paŝo en longa marŝo de dekmil li-oj. ... La ĉina revolucio estas grandioza, sed la vojo post la revolucio estos pli longa, la laboro pli grandioza kaj pli peniga. Tion ni devas bone klarigi en la Partio nun, por ke la kamaradoj daŭre restu modestaj, prudentaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de malluksa vivado kaj penema luktado.**” La instruo de Prezidanto Maŭ hele prilumis lian koron kvazaŭ vojmontra lampo. Supren rigardante la portreton de Prezidanto Maŭ, li ĵuris senvoĉe: “Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Mi ĉiam estos fidela al vi, firme aŭskultos viajn vortojn kaj konservos la naturon de la laborista klaso. Same kiel en montgrimpado, mi postlasos miajn piedsignojn kaj grimpos al la alta montpinto de proletara kolektivismo!”

Ma Ĝenhua estis riparisto de traktoroj. En aŭtuno de la pasinta jaro, foje iu kamarado de la traktor-pluga taĉmento iris al vilaĝoj por kolekti pagojn por terplugado kaj vidis, ke iu dizelo de Jaŭĝaj-brigado difektiĝis, pro kio la komunumanoj maltrankviliĝis kvazaŭ formikoj en varma kaldrono. Reveninte al la oficejo, la kamarado komunikis tion al maljuna Ma, kaj en la sekvinta nokto la

lasta piediris en mallumo pli ol tridek liojn kaj atingis Jaŭĝaj-brigadon je la tagiĝo. Foje kaj refoje li ekzamenis kaj riparis la difektitan dizelon, kaj finfine ĝin rebonigis. Poste, kamarado Ma Ĝenhua defrotis la olemalpurajon sur siaj manoj kaj volis foriri kaj ne atendis por preni manĝon. La komunumanoj sentis bedaŭron kaj lin demandis: “Kamarado, kio estas via nomo?” Ma Ĝenhua forviŝis la ŝviton de sur la vizaĝo per sia mano kaj diris kun rideto: “Mi nomiĝas laboristo de Prezidanto Maŭ.”

Fariĝinte vicĉefkomitatano de la gubernia revolucia komitato, Ma Ĝenhua daŭre persistas en partopreno de kolektiva produkta laboro. Li ofte diras: “Oni devas gvidi en praktiko, fizika laboro tre gravas.” Tial, tuj kiam li ekhavas liberton, li revenas al sia propra unuo por ripari traktorojn. Iuj laboristoj diris al li humure: “Maljuna Ma, la fulge nigra olea koto tuj malpurigas la manon, se vi ĝin ektuŝas!”

“Ne gravas malpuriĝo de la mano, sed terura estas malpuriĝo de la penso,” respondis Ma Ĝenhua serioze. “Malpura mano bezonas nur lavadon, sed malpura penso povas konduki al degeneriĝo de homo!” Tion aŭdinte, iu maljuna laboristo diris ĝoje: “Prave! Havante tian reprezentanton, ni liberiĝos de zorgoj.”

## II

Ma Ĝenhua ofte diras al siaj bataalkamaradoj: “Nun tenante la potencon en niaj manoj, ni nepre ne devas nin trakti kiel eksterordinarulojn. Eksterordinareco glitiĝos al reviziismo.”

En la tago de la fondiĝo de la gubernia revolucia komitato, la kamaradoj bonvole aranĝis apartan oficĉambron por li sola. Ĝi estis meblita per mola litego, komforta glicinea brakseĝo, skribotablo, ŝranko por enteni dokumentojn, telefona aparato ktp. Kiam Ma Ĝenhua vidis la luksigitan ĉambron je la enpaŝo, li tuj senvorte foriris de ĝi portante siajn litaĵojn. Iuj kamaradoj diris al li: “Tiu ĉi ĉambro estas por vi!”

“Tian ĉambron mi ne volas!” diris Ma Ĝenhua humure, “Loĝante en tia ĉambro oni malsaniĝos.” Tion dirinte, li reportis siajn litaĵojn al la kolektiva dormejo. Ĝis nun kamarado Ma Ĝenhua ne havas sian apartan oficĉambron, nek sian fiksan dormĉambron. Li havas nur senkoloriĝintan flavan



*Kamarado Ma Ĝenhua ne ĉesas partopreni fizikan laboron.*

sakon, kiun li portadas ĉiutage dum lernado, fizika laborado, kunveno kaj aliaj laboroj. La amasoj diris: “La flava sako de maljuna Ma servas kaj kiel dokumenta ŝranko kaj kiel skribotablo. Li portas ĝin ĉien, kien li iras. Li vere similas en stilo al la anoj de la iama Okavoja Armeo!”

Kamarado Ma Ĝenhua estas rigora al si mem kaj bone aŭskultas la kritikojn de la amasoj. La gubernia revolucia komitato fondiĝis ĝuste je la tempo, kiam intense iris la printempa plugado. Kun plena revolucia entuziasmo, Ma Ĝenhua deziregis plene montri sian ruĝan koron al la popolo de la tuta gubernio. En iu kunveno de la konstanta komitato li diris: “Ni firme decidu reformi la ofte pluvindatajn, sablajn kaj alkalajn parcelojn kaj ĝisfunde ŝanĝu la postiĝintan fizionomion en produktado de Dongming-gubernio.” Laŭ lia propono, la revolucia komitato decidis transpostenigi kadrojn al la produkta direktoro por ĝin fortigi kaj fondis plian sekcion. Tuj kiam tio estis aranĝita, revoluciaj amasoj jam elmetis akrajn kritikojn dirante: “La gubernia revolucia komitato ja malantaŭen iras per organizo de tiel granda personaro speciale

por teni la produktadon!”

Aŭdinte tiun kritikon, Ma Ĝenhua surpriziĝis: “Kial nomi tion iri malantaŭen? Tio ja estas evidente por solvi la problemon de manĝo kaj vestoj de la popolo de la tuta gubernio!” Sed poste, li detale pripensis la kritikojn, kaj ju pli li pensis, des pli li bone vidis la pravecon de ili. Jes ja, por altigi la produktadon, oni ne devas sinapogi sur organizo de granda personaro por ĝin prizorgi, sed sur elstarigo de la proletara politiko. Se oni forlasas la meton de politiko en komandon kaj tenas nur produkton, do oni certe faros la saman eraron de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon “teni nur la produkton de greno, kotono kaj oleo, sed ne distingi la malamikojn, nin mem

kaj la amikojn”. Ĉu tio ne signifas ĝuste iri malantaŭen? Li ekvidis, ke li iris sur eraran vojon. Kion fari? Ma Ĝenhua faris laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: “**Kiam eraro estas farita, ni devas ĝin korekti, ju pli rapide kaj ĝisfunde, des pli bone.**” Li iris profunden en la popolamasojn, aŭskultis kritikojn kaj demandis al ili, kiajn opiniojn ili havas. Poste, li mem kritikis siajn erarajn pensojn en pli vastigita kunveno de la konstantaj komitatanoj, studis kune kun la aliaj la instruon de Prezidanto Maŭ pri “**elitigo de trupoj kaj simpligo de administrado**” kaj decidis iri la vojon de elstarigo de la proletara politiko. Post la kunveno, li nuligis la sekcion por tenado de produkto, fondis gvidan sekcion pri studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ kaj organizis propagandan taĉmenton de la penso de Maŭ Zedong, kiu, sub la gvido de la Konstanta Komitato de la gubernia revolucia komitato, iris profunden en produktajn brigadojn kaj kune kun la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj certigis la efektivigon de la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ. Tia aranĝo ricevis bonvenigon de la vastaj revoluciaj

amasoj kaj revoluciaj kadroj. Ili diris, ke maljuna Ma aŭskultas la kritikojn de la amasoj, sin metas sub la supervido de ili kaj korektas siajn erarojn senprokraste, kaj li estas fidinda.

De multaj jaroj, kamarado Ma Ĝenhua persistas ĉe kreiva studo kaj kreiva aplikado de la penso de Maŭ Zedong, kaj ĉiufoje kiam li renkontas problemon, li konsultas verkojn de Prezidanto Maŭ por trovi solvon. Li ofte diras al siaj kamaradoj: “Ni laboristoj havas larĝajn ŝultrojn kaj portas pezan ŝarĝon, neniam devas vanigi la esperon de nia amata Prezidanto Maŭ kaj neniam devas forlasi la revoluciajn trezorajn librojn de Prezidanto Maŭ kaj lian proletaran revolucian linion.”

Fariĝinte vicĉefkomitatano de la gubernia revolucia komitato, li marŝas antaŭen spite al malfaciloj en ĉio, kaj aktive atakis la klasajn malamikojn kaj meminciate iris al la unuoj por solvi iliajn malnovajn, gravajn kaj malfacilegajn problemojn. Antaŭ iom da tempo, la gubernia revolucia komitato ricevis plurajn sinsekvajn leterojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj petantaj, ke membroj de la revolucia komitato iru al la Ginĝuang-brigado de Matoŭ-komunumo por helpi ĝin en laboro. Kaj post konsento de la konstantaj komitatoj de la gubernia revolucia komitato, kamarado Ma Ĝenhua piediris al Ginĝuang-brigado dorsportante siajn litaĵojn, kun ses kamaradoj sub sia gvido.

Ma Ĝenhua kaj la kamaradoj kunirintaj loĝis kaj manĝis ĉe familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la tagoj ili propagandis la serion da plej novaj instrukcioj de


Prezidanto Maŭ dum laboro; nokte, ili aranĝis kunsidojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por interŝanĝi sperton en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong, rememori la amarajn tagojn de la malnova socio kaj la dolĉon en la nova socio kaj kontraŭbatali egoismon kaj kritiki reviziismon. Ili firme decidis turni la brigadon en grandan lernejon de la penso de Maŭ Zedong. Tiam, la plenmano da klasaj malamikoj provis gajni favoron de kamarado Ma Ĝenhua per regalo, por savi sin el la sorto de tuja perejo. Ma Ĝenhua tuj malkaŝis la ruzan intrigon de la klasaj malamikoj ĉeloke kaj diris al ili severe: “En la pasinteco vi faligis nombron da kadroj per sukertegitaj obusoj, sed hodiaŭ ni proletaraj revoluciuloj armitaj per la penso de Maŭ Zedong absolute ne falos en vian kaptilon. Ĉu vi intencas nin fortiri de la ĝusta vojo? Rezignu vian fiintendon!”

La malamikoj sin fortrenis en griza humoro. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ekridis kaj diris: “Maljuna Ma estas homo staranta ĉe la flanko de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!”

Post intensa luktado de pli ol unu monato, la plenmano da klasaj malamikoj de Ginĝuang-brigado estas eltirita! La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sentas ĝojon kaj fieron de venkinto, kaj arde iras la revolucio kaj la produktado.

Dank’ al pluv’ kaj rosoj forte kreskas la plantaĵoj, sub la bril’ de l’ pens’ de Maŭ Zedong kreskas la nova generacio. Kaj kamarado Ma Ĝenhua estas unu el la miloj kaj dekmiloj da novaj homoj.

*Kamarado Ma Ĝenhua (la unua de maldekstre) interŝanĝas opiniojn pri produkta laboro kun revolucia amaso.*



# *Kiel Lernanto de Laboristoj*

**E**N februaro de la kuranta jaro, en la bonega situacio de batalakiro por la plenampleksa venko de la granda proletara kultura revolucio de nia lando, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ ke **“La intelektaj junuloj kaj junaj lernantoj de la tuta lando nepre devas kombini sin kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj”**, mi surŝultrigis mian pakaĵon, eliris el nia universitato kaj venis al la Hingtaj-a Fabriko por Ripari kaj Konstrui Metalurgiajn Maŝinojn por fariĝi ordinara laboristino.

Dum la pasinta duonjaro mi profunde sentis, ke la laboristoj havas tre riĉan, praktikan batalscion pri klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, kaj samtempe mi ankaŭ profunde sentis, ke troviĝas granda distanco inter la klasbatala kaj produktbatala praktiko kaj la ellibra scio, kiun mi akiris en la universitato, kaj ke la scio, kiu kombiniĝas nek kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj nek kun la praktiko de produkta laboro kaj klasa batalo, estas tute nefidinda.

En tiu duonjaro, dum kiu mi fikse loĝis en la fabriko, sub la fervora helpo de la laboristoj, mi ekfaris, eble mi povas tiel diri, la unuan paŝon sur la larĝa vojo de kombiniĝo kun la laboristoj.

## I

Pro mia sufiĉe profunda veneniĝo de la reviziisma eduka linio de la ĉina Ĥruŝĉov dum longa tempo, mia burĝara individuisma penso ĉiam elmergiĝis, kiam aperis kontraŭdiro inter la bezono de la patrio kaj mia propra “deziro” aŭ “idealo”.

Antaŭ mia veno al la fabriko, mi pensis, ke mi jam studis kvin jarojn pri fandado en politeknika kolegio kaj almenaŭ lernis iom da teorio, kvankam mankas al mi praktiko. Mi devas do iri al uzino en granda urbo, kaj nur tiam mi povos apliki kion mi lernis, kaj disvolvi mian teknan kapablon kaj fari grandan kontribuon al la patrio kaj la popolo. Pro tio mi tute ne prenis malgrandan fabrikon en miajn okulojn.

Kun tiu aktuala ideo en la kapo mi studis la brilajn tri popularajn artikolojn kaj *La Direkto de la Junulara Movado* de Prezidanto Maŭ. La granda instruo de Prezidanto Maŭ, kiel vojmontra lampo, klare montris al mi la direkton de antaŭeniĝo kaj donis rektan baton al la egoismo en mia cerbo. Nun denove aperis vivece antaŭ miaj okuloj la sceno de akcepto fare de Prezidanto Maŭ al ni ruĝaj gvardianoj: Sur la pordego Tiananmen Prezidanto Maŭ de tempo al tempo manŝvingas al ni, li estas senkompare intima al ni la juna generacio kaj metas sur nin senliman konfidon kaj senfinan esperon. Li, nia amata, montras al ni la direkton de antaŭeniĝo svingante sian grandan manon. Rememorante la feliĉan momenton, mi sentis eksterordinaran ekscitecon kaj honton. Fronte al la portreto de Prezidanto Maŭ mi ĵuris, ke mi firme sekvos ĉiun lian batalordonon kaj decide iros la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj.

Kiam leviĝas en mia koro la ruĝa suno, troviĝas jam neniu baro antaŭ mi sur la vojo. Plena de pasio mi suriris la novan postenon.





*Jang Jufang (la dua de dekstre) studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun laboristoj.*

## II

Laŭ la asigno de la fabrika revolucia komitato mi laboris en la ŝtalmuldejo kiel muldisto. Ĉe la komenco mi estis plena de entuziasmo kaj energio. Post dekelkaj tagoj doloris al mi gamboj kaj la talio, la kvar membroj senfortiĝis, kaj mi malkuraĝiĝis antaŭ la malfacilo. Tiam mi opiniis, ke la laboro de muldado estas tro peza kaj laciga, iom malfacile plenumbla por mi, kaj ke por tia tasko ne taŭgas laboristino. Kaj denove elmergiĝis en mi egoismo kaj aliaj individuaj konsideroj. Mi pensis, ke laŭ la difino de la ŝtato, fininte unujaran laboradon kaj hardadon en praktiko post surposteniĝo, diplomitoj de alta lernejo povas forlasi la produktan laboron kaj fariĝi teknikistoj. Foje mi diris en formo de ŝerco: "Mi jam povos emeritiĝi post laborado de dekelkaj jaroj en la mulda laborsekcio." Veterana laboristo Liu Juanhi tuj travidis mian penson el tiu parolo kaj diris signifoplene, "Juna Jang, Prezidanto Maŭ kulturis vin en lernejo preskaŭ dudek jarojn, kaj vi volas emeritiĝi jam post laborado en nur dekelkaj jaroj. Ĉu vi povas per tio respondi al la espero de Prezidanto Maŭ?" La profunda klasa sento de la

veterana laboristo al Prezidanto Maŭ kaj lia sincera kritiko multe tuŝis mian animon. Tuj ekbrulis mia vizaĝo. Mi pentis pro tia parolo. Post tio la laboristoj konstante kaj fervore helpis min. Liu Juanhi estas veterana laboristo, laborinta kiel muldilisto pli ol dudek jarojn. Li ofte venis al mi por reciproke elverŝi unu al la alia la koron kaj helpis min levi la klasan konscion. Foje li diris: "En la malnova socio ni laboristoj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj vivis kiel bovoj kaj ĉevaloj. Kiel ni povus viziti lernejon anstataŭ suferi vipadon kaj malsaton? Nun niaj gefiloj havas ŝancon studi en altaj lernejoj, kaj ni ŝuldas tiun nian feliĉon al nia amata Prezidanto Maŭ. Sed nun troviĝas iuj, kiuj tenas la nazon supren ĝis la ĉielo, leginte librojn nur kelkajn jarojn. Ili ne aplikas kion ili lernis por bone servi al la popolo kaj rekompenci per tio bonfaron de nia amata Prezidanto Maŭ, sed ĉasas renomon kaj promocion, utiligante sian scion kiel kapitalon por akiri famon kaj profiton. Tiaj homoj devas bone pripensi, ĉu ili ne sentas honton antaŭ Prezidanto Maŭ?" Ĉio, kion diris tiu veterana laboristo, tuŝis mian animon kaj trafis mian gravan difekton. Tio donis al mi tre pro-

# Aklamoj de Soldatoj

fundan klasan edukon, tiel ke mi des pli malamas la ĉinan Ĥruŝĉov kaj la de li antaŭenpuŝitan reviziisman edukan linion. Poste mi energie batalis kontraŭ mia egoismo en la kurso de la penso de Maŭ Zedong por laboristoj de la tuta fabriko.

Post la batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo mi sentis ke mia koro pli proksimiĝis al tiu de la laboristoj, kaj mia volo fariĝis pli firma por ĉiam aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj servi al la popolo kiel muldisto por la tuta vivo.

### III

Prezidanto Maŭ diris: **“La plej saĝa, plej talenta estas batalanto, kiu plej ofte havas praktikan sperton.”** Kiam mi venis al la laborejo, mi tute ne imagis, ke akirinte grandan amason da scio el la libroj en lernejo, mi fariĝos en praktiko blindulo kun vidantaj okuloj. En universitato, mi devis parkere citi ĉiutage tiom da fojoj la nomojn de “sabloj”. Tamen, en la mulda laborsekcio, starante antaŭ la “sabloj” mi povis nek distingi nek nomi ilin. Dume la laboristoj lernis kvankam nur malmultajn jarojn, ili tamen bone posedas la produktan teknikon kaj multe kreis kaj inventis, nur post kelkjara laborado en la fabriko, ĉar ili havas ruĝan koron senfine fidelan al Prezidanto Maŭ kaj ĉasas nek famon nek profiton sur la vojo al scienco kaj tekniko, kun la tuta koro dediĉata al revolucio. En aferoj, pri kiuj la antaŭuloj ne kuraĝis pensi, ili havas la kuraĝon pripensi, iniciati kaj fari. Ili konkeris, unu post alia, tiujn teknikajn malfacilojn, kiujn la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatoj” ne solvis aŭ tute ne povis solvi.

Sennombraj vivaj faktoj min profunde instruis. **“La pleba estas la plej saĝa dum la aristokrata estas la plej stulta.”** Tio estas vero absolute nekontestebla.

Dum praktiko de la produkta batalo en la pasinta duonjaro mi ŝvitis kaj grasmakulis min kune kun la laboristoj. En la unua tempo post mia alveno al la laborejo, la laboristoj bonvole ne lasis min deĵori nokte. Mi pensis, ke en revolucio mi ne devas ĝui privilegion, nek translasi mian propran ŝarĝon sur alies ŝultrojn. Ju pli malfacila estas la laboro, des pli bona estas la ŝanco por hardi kaj provi min. Post ripetada peto mi fine partoprenis ankaŭ la noktan deĵoron.

Mi jam faris la decidon forigi miajn arogantajn manierojn de studento, preni la laboristojn kiel miajn instruistojn, meti min sub la gvidon de la laborista klaso, diligente penadi en remuldo de mia mondkoncepto kaj servi kiel ordinara laboristino por la tuta vivo.

**E**N aŭtuno antaŭ 47 jaroj, nia granda instruanto Prezidanto Maŭ grandpaŝe marŝis kun levita kapo sur Anjuan-monton, portante la pezan ŝarĝon de la ĉina revolucio. Rigardante la olepenetraĵon *Prezidanto Maŭ al Anjuan*, la vastaj amasoj de la ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj diris emocie: Tiu ĉi olepenetraĵo tre vivece kaj sukcese bildigis la brilan figuron de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en lia juneco. Naskiĝo de la olepenetraĵo estas giganta frukto en efektivigo de la granda penso de Prezidanto Maŭ **“utiligi la antikvajn en servo al nuntempo kaj utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio”** kaj granda venko de la proletara revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ!

Kiam la faksimilaj presaĵoj estis senditaj al la ruĝa Karbominejo de Anjuan, la tieaj amasoj ekbolis de ĝojo. Kiom da amoplenaj vortoj svarmis en la koro! Ho, Prezidanto Maŭ! Ho, Prezidanto Maŭ! Ja estas vi, kiu propramane ekbruligis la revolucionan fajregon de Anjuan! Ja estas vi, kiu persone direktis la laboristan movadon de Anjuan! La vastaj amasoj de la laboristoj rememoris, kiel Prezidanto Maŭ persone gvidis ilin konduki revolucion kaj ĉiuj dronis en senlima feliĉo kaj ekscitiĝo. Ili diris: Kiel ni povas nin deteni de ĝojego, kiam en la granda proletara kultura revolucio ni jam inversigis denove la historion inversigitan de la granda laborista perfidulo kaj granda renegato la ĉina Ĥruŝĉov!

Kiam la presitaj kopioj estis portitaj en la revolucionan lulilon Gingga-montaro, ekjubilis la tiea revolucia popolo. Avo Deng Venkaj, la estro de la iama ribela brigado de Daging-vilaĝo ricevis pecon kaj ĝin rigardis kaj rigardis kun amo. Li diris emocie: “Tiutempe, ĝuste kiel la olepenetraĵo prezentas, Prezidanto Maŭ venis de Anjuan al Gingga-montaro, spite al malfaciloj kaj danĝeroj post longa peniga vojaĝo, kaj bruligis ĉe ni revolucionan fajregon. Depost tio, de Gingga-montaro al Ĵujĝin, de Ĵujĝin al Jan-an, de Jan-an

# *Laboristoj, Kamparanoj kaj al la Revolucia Olepentraĵo “Prezidanto Maŭ al Anjuan”*



*Tenante la revolucion olepentraĵon “Prezidanto Maŭ al Anjuan”, laboristoj de la gisejo de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko laŭte kantas la kanton “Longan Vivon al Prezidanto Maŭ”.*

al Pekino, la revolucia incendio envolvis la tutan landon. Ni heroaj gefiloj de Gínggang-montaro por ĉiam kondukos revolucion strikte sekvante Prezidanton Maŭ kaj firme decidis portadi de generacio al generacio la revolucion torĉon persone bruligitan de Prezidanto Maŭ.”

Antaŭ 33 jaroj, la revolucia popolo de la fama historia urbo Zunĵi bonvenigis Prezidanton Maŭ ĉe la pontkapo de Ĵinghong-pasejo, kantante revolucion kanton: “Ni ĉiuj jubilas pro l’ veno de

l’ Ruĝa Armeo, kaj ĉiuj ĝoje krias bonvenon al Prezidanto Maŭ.” Hodiaŭ, ekvidante la olepentraĵon *Prezidanto Maŭ al Anjuan* en kantado pri la plena triumfo de la granda proletara kultura revolucio, la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj de Zunĵi kvazaŭ feliĉe vidis Prezidanton Maŭ denove ĉe la pontkapo de Ĵinghong-pasejo, kaj rememoris la brilan historion kiel Prezidanto Maŭ gvidis la ĉinan popolon marŝi de venko al venko. Veterana batalanto de la Ruĝa Armeo

Ding Ŝimin diris kun emocio: “Ho, Prezidanto Maŭ! Ho, Prezidanto Maŭ! Nur dank’ al via saĝa gvido la ĉina revolucio ekhavis ĝustan linion. Ni nepre strikte sekvos por ĉiam vian proletaran revolucion linion por marŝi de venko al venko!”

La membroj de la Jan-an-a Studrondo de la Penso de Maŭ Zedong ĉiuj sentis ĝojon kaj kuraĝigon ekvidinte la olepentraĵon *Prezidanto Maŭ al Anjuan*. Memorante la 13 jarojn dum kiuj Prezidanto Maŭ komandis en Jan-an la tutlandan popolon en heroa batalado kaj retrorigardante la bataladon de la granda proletara kultura revolucio persone iniciatita kaj persone gvidata de Prezidanto Maŭ, ili diris: “Ho Prezidanto Maŭ, Prezidanto Maŭ! La brilaj verkoj kiujn vi verkis volumon post volumo en la kaverndomoj de Jan-an ĉiam servas kiel lumturo nin direktanta al venkoj! La serio da instrukcioj donitaj de vi en la granda proletara kultura revolucio ĉiam servas kiel vojmontra lampo por ni en daŭra revoluciado sub la kondiĉoj de la proletara diktaturo! Ni, jan-an-aj gefloj, ĉiam estas fidelaj al vi, al via brila penso kaj al via revolucia linio, kaj nepre kondukos la

grandan politikan revolucion de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluatataj klasoj!”

La granda olepentraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan* estis sendita al la Lugoŭkiaŭ-a Popolkomunumo en antaŭurbo de Pekino, kiun nia granda instruanto Prezidanto Maŭ iam inspektis. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, kiuj antaŭe vidis Prezidanton Maŭ propraokule, elprenis la foton faritan dum lia inspekto kaj rigardadis ĝin kun emociaj larmoj. Ili diris: “Antaŭ dek jaroj, Prezidanto Maŭ iris tra la tuta lando kaj venis al ni por vidi nin malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn kaj gvidis nin suriri la helan vojon de komunumigo. Kaj hodiaŭ, Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidas la grandan proletaran kulturalan revolucion kaj frakasis la intrigon de la ĉina Ĥruŝĉov kaj liaj agentoj restaŭri kapitalismon. Prezidanto Maŭ ĉiam ligiĝas kun ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj koron kun koro kaj ni revoluciados firme lin sekvante dum la tuta vivo!”

Kiam la olepentraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan* venis al Ĝengĝou, la loko kie fontis la granda



*Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj ĝoje rigardas presitan kopion de la revolucia olepentraĵo “Prezidanto Maŭ al Anjuan”.*

Striko de la Sepa de Februaro, ekbolis la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj mil- kaj dek-mil-foje ili ĝojkriis: “Longan vivon al Prezidanto Maŭ!” Veterana laboristo Tang Kiŝan, nun vicestro de la Revolucia Komitato de la Ĝengĝoŭa Fervoja Buroo diris: “Frue antaŭ 47 jaroj, Prezidanto Maŭ jam iris al Anjuan portante la pezan ŝarĝon de la ĉina revolucio kaj la esperon de la ĉina nacio, tra la revolucia uragano, lanĉis kaj gvidis laboristan revolucion movadon kaj komencis la venkan navigadon de la ĉina revolucio. Nur dank’ la la saĝa gvidado de Prezidanto Maŭ povas esti akirita la liberigo de la tuta ĉina popolo. Prezidanto Maŭ ja estas nia granda savanto!”

En ekvido de la olepenetraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan* aparta intimeco venis al la maljuna ŝarĝisto Ĝong Hengŝan, kiu estante membro de laborista pikedo de Vuhan feliĉe vidis nian grandan instruanton Prezidanto Maŭ en 1927. Li diris: “La penetraĵo estas bonega, ĝi restarigis la veran fizionomion de la historio de nia laborista movado. Antaŭ 40 jaroj, la ĉina Ĥruŝĉov perfidis la laboristaron en Vuhan, perfidis la revolucion, devigis nin laboristan pikedon fordoni pafilojn al la reakciularo de Kuomintango, ordonis malorganizi nian laboristan pikedon kaj rezulte forvendis la laboristan movadon, vikle disvolviĝantan en Vuhan-regiono sub la direkto de la penso de Maŭ Zedong. Ja estas tre ĝojiga afero, ke ni likvidis la krimojn de la ĉina Ĥruŝĉov, deŝiris lian maskon kaj malkaŝis lian veran vizaĝon de granda renegato kaj laborista perfidulo en la granda proletara kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ!”

En Ŝanhajo, kiu havas laboristaron de unu miljon personoj, la vastaj revoluciaj amasoj konkure klopodas frue rigardi kun estimo kaj adoro la brilan figuron de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la penetraĵo. Centoj da revoluciaj laboristoj, malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj batalantoj de literaturo kaj arto ĝoje okazigis kunvenon por prezenti kantojn kaj poemojn por glorigi la ruĝan sunon, kiu prilumis Anjuan-monton. Iu laboristo kantis kun patoso:



*Laboristoj de la karbominejo de Anjuan absorbite rigardas la altan brilan figuron de Prezidanto Maŭ kaj varme laŭdas la revolucion olepenetraĵon.*

*La akvoj de Anjuan lunon sopiradis,  
La homoj de Anjuan la savanton atendadis.  
Finfine l' ruĝa sun' de Saŭŝan venis,  
Grizajn nubojn kaj nebulojn dispelis, marksism-leninismen ekdissemis.*

*Tra Ginggaŝ-montar' ekflirtis ruĝaj flagoj en  
la vento,*

*Radias ruĝa brilo tra l' kvin kontinentoj!*

Tenante per ambaŭmanoj la olepenetraĵon *Prezidanto Maŭ al Anjuan* tre grandan ĝojon sentis la vastaj amasoj de la komandantoj kaj batalantoj de pekina garnizona trupo ĉe nia granda instruanto Prezidanto Maŭ. Ili ĵuris antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ: “Ho, Prezidanto Maŭ! Ho, Prezidanto Maŭ! La batalo ĉe Anjuan, la fajreroj en Ginggaŝ-montaro, la aŭroro ĉe la urbo Zunji, la lamplumo de Jan-an kaj la ruĝaj standardoj sur Tian-anmen-pordego — ja ĉiu antaŭenpaŝo sur la ĉina revolucia vojo estas farita sub via persona direktado! Ja ĉiu paĝo de la ruĝa epopeo de la ĉina revolucio flagras per la brilo de via granda penso! Ni, viaj gvardianoj, ĵuras defendi vin, vian brilan penson kaj vian proletaran revolucion linion per sango kaj vivo kaj ĉiam esti ruĝaj sentineloj de via revolucia linio!”

# Varma Kanto pri Prezidanto Maŭ

**K**E la olea pentraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan* povas esti prezentita al la tutlanda popolo, tio estas la frukto de la eduko kaj kuraĝigo kiujn la brila penso kaj granda revolucia praktiko de Prezidanto Maŭ faris al ni, tio estas la frukto de la intima zorgado kaj fervora subtenado al ni fare de estimata kamaradino Giang King, kaj la frukto de varma helpado, kiun la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj donis al ni.

En julio de 1967, la proletaraj revoluciuloj de la ĉefurbo, Gianghi-provinco kaj Anjuan kune preparis la ekspozicion “Brilo de la Penso de Maŭ Zedong Lumigis la Laboristan Movadon en Anjuan”. La preparadon ni partoprenis kiel ruĝaj gvardianoj kaj revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj de Prezidanto Maŭ. La tasko asignita al mi estis verki olean pentraĵon priskribantan la vojaĝon de Prezidanto Maŭ al Anjuan en aŭtuno de 1921. Mia fako estas industria belarto, kaj mi neniam lernis olepentradon, tial la tasko por mi estas tre malfacila. Sed, kiam mi ekpensis pri Prezidanto Maŭ kaj la korsento de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj tiel soife deziras vidi la brilan figuron de Prezidanto Maŭ, kreskis al mi la decidemo kaj kuraĝo por venki la malfacilojn. Mi estas filo de malriĉkampano. Post la Liberiĝo, mi havas la eblon lerni en alta lernejo. Tiun feliĉon donis al mi ja Prezidanto Maŭ. Mi kreskis dank’ al la nutrado de la laboranta popolo per sia sango kaj ŝvito. Mi devas sekvi la vortojn de Prezidanto Maŭ, fariĝi fidela parolanto de la amaso, ami kion amas la amaso, pentri kion bezonas la amaso, kaj tutkore kaj tutanime servi al la popolo.

Por plenumi tiun gloran bataltaskon, ni vizitis la fervojon kaj karbo-minejon de Anjuan, kie Prezidanto Maŭ persone bruligis siatempe la revolucian fajron. Antaŭ ol ni veturis al Anjuan, ni studis koncernajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj multan historian materialon pri la laborista movado de Anjuan. En Anjuan, el intervjuado

kun maljunaj laboristoj, ni pli konkrete ekkonis la veran historion de la batalo de tieaj laboristoj. De 1921 ĝis 1930, Prezidanto Maŭ multfoje venis al Anjuan, kaj gvidis tie la heroajn laboristojn en arda revolucia batalo. Estis Prezidanto Maŭ, kiu persone semis revoluciajn fajrerojn en Anjuan, faris marksism-leninisman edukadon al la laboristoj kaj starigis organizojn de la Komunista Partio kaj la Komunista Junulara Ligo. Estis Prezidanto Maŭ, kiu persone faris la saĝan decidon pri ĝenerala striko en Anjuan kaj alvokis la laboristojn komenci firman batalon. Estis Prezidanto Maŭ, kiu persone aranĝis en Anjuan la mondiskuan Aŭtunan Ribelon, kreis la unuan laboristan-kamparanan armeon kaj gvidis ĝin al Ginggang-montaro, malfermante la brilan vojdon de sieĝo de la urbo per la kamparo kaj de kapto de regpotenco per armita forto. La granda revolucia praktikado de Prezidanto Maŭ en Anjuan estas senkompare impona epopeo. Sed, de longa tempo, la ĉina Ĥruŝĉov simple atribuis alies meriton al si mem, priskribante la batalon de la anjuan-aj laboristoj persone gviditan de Prezidanto Maŭ kiel sian atingon. Por starigi al si monumenton, li eĉ ordonis siajn lakeojn krei por li nigrajn pentraĵojn, filmon, rememorajn skribojn ktp, por kontraŭfakte ŝminki la laboristan perfidulon kaj pajacon kiel “heroon” “gvidintan” la batalon de la anjuanaj laboristoj. Lia krimo estas vere ĝisĉiela! Ni, ruĝaj gvardianoj de Prezidanto Maŭ, devas nepre reĝustigi la historion inversigitan de la ĉina Ĥruŝĉov!

Ni unue vizitis maljunajn laboristojn kiuj partoprenis la ĝeneralan strikon iniciatitan kaj gviditan persone de Prezidanto Maŭ antaŭ 46 jaroj, kaj ankaŭ maljunajn ruĝarmeanojn kiuj partoprenis la “Aŭtunan Ribelon” persone organizitan kaj gviditan de Prezidanto Maŭ. Kun emocio kaj fiero, tiuj maljunaj laboristoj kaj ruĝarmeanoj detale rakontis al ni, kiel komitatano Maŭ siatempe venis al Anjuan, kiel li intime interparolis kun laboristoj, kiel li vekis ilian klasan konscion, kaj ke

estis li, kiu la unua disvastigis la veron de marksism-leninismo en la korojn de la anjuan-aj laboristoj. De tiam, dek sep mil fervojaj kaj minejaj laboristoj vidas la bluan ĉielon, forigante ĉiujn nubojn kaj nebulon.

Ili krome priskribis al ni entuziasme la fizionomion de la estimata komitatano Maŭ radiantan de heroeco kaj freŝa juneco, kaj la tiaman temperamenton de nia granda gvidanto karakterizatan per firma refleksiĝo, profunda seriozeco kaj aplombeco. Ili gvidis nin al la ŝakto, en kiun Prezidanto Maŭ malsupreniris siatempe dum sia kontakto kun la laboristoj. Poste ili montris al ni la antaŭan sidejon de la vespera lernejo de laboristoj starigita de Prezidanto Maŭ kaj diris kun senlima emocio: “Ĝuste en tiu ĉi loko, ni anjuanaj laboristoj unuafoje eksciis la veron, ke la suferojn de laboristoj kaŭzas ne ilia sorto, sed la kruelaj subpremado kaj ekspluatado fare de la imperiistoj kaj kapitalistoj, kaj ke la laboristoj trovas sian elirejon nur kiam ili unuiĝos por fari revolucion. Cetere montrante al ni la simplan loĝejon, en kiu siatempe Prezidanto Maŭ loĝis, ili diris: Ja en tiu ĉi loko, Prezidanto Maŭ faris la dispoziciojn de la ĝenerala striko de niaj dek sep mil anjuanaj fervojaj kaj minejaj laboristoj. Parolante pri tio, la maljunaj

laboristoj laŭte kriadis kun emocio: “Vivu Prezidanto Maŭ!”

Dum la konigado pri la revoluciaj faroj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la maljunaj laboristoj indigne akuzis la dekstran oportunistan linion antaŭenpuŝitan de la ĉina Ĥruŝĉov kontraŭstaran al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ en la laborista movado de Anjuan, kaj ke pro la perfido de la ĉina Ĥruŝĉov, la movado de anjuanaj laboristoj en iu tempo suferis seriozan repuŝon kaj multaj klasaj fratoj malfeliĉe oferis sian vivon. La maljunaj laboristoj indigne diris: La ĉina Ĥruŝĉov estas granda perfidulo de laboristoj, kiu perfidis la interesojn de la laborista movado de Anjuan, kaj ni anjuanaj laboristoj havas nepacigeblan, profundan malamon kontraŭ li.

Ilia senlime varma amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ĝisosta malamo kontraŭ la ĉina Ĥruŝĉov donis al ni tre grandajn edukon kaj inspiron. La viva kaj detala rakontado de tiuj maljunaj laboristoj kaj ruĝarmeanoj liveris al ni ekstreman valoran materialon por kreado.

Poste, ni vizitis ankaŭ la malnovan loĝejon de la granda gvidanto en Ŝaŭŝan kaj Kingŝujtang, kie



*La pentrinto de la ole-pentraĵo kamarado Liu Ĉunhua (la unua de dekstre) informiĝas ĉe laboristoj de Hin-hua-presejo pri la procedo de presado de la pentraĵo.*

li antaŭe loĝis en Ĉangŝa, kaj laŭiris parton de la vojo, laŭ kiu Prezidanto Maŭ siatempe iris de Hunan al Anjuan. Dum la irado, ni imagis al ni la tiaman brilan figuron de Prezidanto Maŭ sur la vojo al Anjuan kaj klopodis koni lian grandiozan spiritan mondon. Kaj samtempe, ni faris ankaŭ iujn skizojn pri pejzaĝoj sur la vojo por trovi bazon por la fono de la verkota pentraĵo.

Antaŭ la komenco de kreado, ni refoje studadis la koncernajn verkojn kaj poemojn de Prezidanto Maŭ por bone kompreni la brilan penson de Prezidanto Maŭ.

En kreado de la pentraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan*, la plej grava punkto estis prezenti la brilan figuron kaj grandan penson de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en lia juneco, kaj ĉio sur la pentraĵo devis servi al tio. Por koncentre reliefigi la brilan figuron de Prezidanto Maŭ, ni metis la figuron de Prezidanto Maŭ sur la plej okulfrapan lokon en la kompono. La nobla figuro de Prezidanto Maŭ iras renkonte al ni, kvazaŭ disradiana suno matena leviĝas antaŭ ni, alportante senliman esperon. En la aranĝo de moviĝo, ni devas doni certan sencon al ĉiu el moviĝetoj: La iom levita kapo kaj iom turnita nuko montras lian revolucian spiriton sentiman al malfacileco, danĝero, perforto kaj kuraĝan por batali kaj venki; la firme pugniĝinta maldekstra mano esprimas ke Prezidanto Maŭ havas firman, ĝisfundan, decideman heroan volon batalakiri la liberiĝon de la tuta Ĉinio kaj tuta homaro, kaj kredon al nepra venko, estante sentima al oferoj kaj preta venki ĉiujn malfacilojn; la malnova pluvombrelo sub la dekstra brako parolas pri penema laborstilo de Prezidanto Maŭ kiu iradas ĉien en vento kaj pluvo, trans montoj kaj riveroj neŝparante penojn kaj laborojn por la revolucio; lia firma paŝo sur la malebena vojo montras ke Prezidanto Maŭ elhakas por ni la vojon kaj gvidas nin venke antaŭen; liaj longaj haroj, netonditaj pro manko de tempo dum intensa laborado, kaj la baskoj de la robo flirtantaj en la aŭtuna vento aludas pri neordinara momento, kiam venos baldaŭ la revolucia ŝtormo. Ni scias, ke post la alveno de Prezidanto Maŭ la montregiono de Anjuan vidis ruĝan aŭroron kaj post la alveno de la savanto Anjuan vidis serene bluan ĉielon. Unuvorte, la montoj, ĉielo, arboj kaj nuboj, ĉio devas enteni penson, formi artan lingvon kaj ludi necesan rolon en reliefigo de la granda figuro de nia instruanto. Prenu la kunigitajn tavolojn da nuboj kiel ekzemplon: ili ne nur prezentas ke Prezidanto

Maŭ venas al Anjuan en momento de akra klasbatalo, dum kiu li montras sin tiom trankvila, aplomba kaj firma, sed ankaŭ antaŭsignas ke la alveno de Prezidanto Maŭ levos novan ŝtormon de klasbatalo!


Por bildigi la brilan figuron kaj grandan penson de Prezidanto Maŭ en lia juneco, oni devas bone elĉizi lian vizaĝan esprimon kaj lian internan, grandan spiritan mondon. Pro la malfacilaj cirkonstancoj de la pasintaj revoluciaj bataloj, postrestis al ni nur tre malmultaj fotoj el lia juneco. Sub tiaj kondiĉoj, la ŝlosilo al sukcesa elĉizo de lia vizaĝesprimo estas bone posedi la penson de Maŭ Zedong kaj uzi ĝin en la gvidado de nia kreado. Post ripetada studado kaj vizitado, fariĝis klare al ni ke ni devas prezenti la revolucian temperaturon kaj grandiozan idealon de Prezidanto Maŭ — tutanime kaj tutkore liberigi la tutan Ĉinion kaj la tutan homaron — pere de lia vizaĝesprimo.

Ni akiris kelkajn fotojn el lia junaĝo. Foje kaj refoje ni pentris laŭ ili por kapti liajn trajtojn en lia juneco. Ni ankaŭ kolektis liajn fotojn el la pli postaj tempoj inkluzive tiujn prenitajn en la granda proletara kultura revolucio, kaj ni kunfandis liajn bildojn viditajn kaj imagitajn en nia kapo, tiel ke pli kaj pli klare aperis al ni la figuro de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en lia juneco. Tiam, kvazaŭ ankaŭ ni mem staris sur Anjuan-monto en la komencaj jaroj de la 20-a jarcento kaj vidis la suferadon de la anjuanaj laboristoj baraktantaj sub la subpremado de la tri grandaj montoj de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo; ni kvazaŭ vidis la indignajn flamojn brulantajn en la koroj de la laboristoj, kaj aŭdis iliajn kriojn alvokantajn fruan venon de la savanto; ni kvazaŭ vidis arojn kaj arojn da laboristoj, kiuj rigardis al la oriento kaj atendis la leviĝon de la ruĝa suno, kaj kvazaŭ vidis la ruĝan sunon leviĝanta disradiane, la ruĝan sunon en niaj koroj leviĝanta super Anjuan-monto! Tiutempe, ni ekprenis la penikon, komencis la pentradon kaj samtempe petis opiniojn de maljunaj laboristoj kaj aliaj kamaradoj. Ni volis koncentri la plej belajn impresojn, kiujn la vastaj revoluciaj amasoj havas en sia sino pri Prezidanto Maŭ. Ni volis plekti nian varman kaj profundan amon al Prezidanto Maŭ en la pentraĵon kune kun la oleo kaj koloriloj. Ni pentris, pentradis en noktoj kaj tagoj, ofte forgesante dormon kaj manĝon, kaj fine plenumis tiun ĉi gloran taskon en unu monato kaj duono.

---

\*La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas studento de la *Centra Industria Belarta Instituto*.





## *La Penso de Maŭ Zedong Gvidas Ilin Antaŭen*

**P**OR batalakiri sendependecon kaj liberecon de sia patrolando, la porliberaj batalantoj de Mozambiko en suda Afriko diligente studas militajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Konstante aplikante la genian militan penson de Prezidanto Maŭ, ili akiris unu venkon post alia en la batalo kontraŭ la kolonia armeo de Portugalio subtenata de la usona imperiismo.

### KONDUKI LA ARMITAN BATALON ĜIS LA FINO

La genia tezo de Prezidanto Maŭ “**El la pafilo venas ŝtatpotenco**” multe kuraĝigas la mozambikajn gerilajn batalantojn, kiuj jam suriris la vojon de armita batalo. La mozambika popolo multe suferinta dum longa tempo la ekspluatadon kaj subpremadojn de koloniismo ekprenis armilojn por



*Porliberaj batalantoj de Mozambiko heroe luktantaj kontraŭ la portugala koloniisma regado subtenata de la usona imperiismo senlime amas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ*


batali heroe, kun ardanta nacia malamo, kontraŭ la kruelaj koloniistoj. Iu porlibera batalanto diris: “Ĝuste kiel montris Prezidanto Maŭ, la reaktularo ne retiriĝos memvole de la scenejo de historio. Ankaŭ la portugala koloniistoj ne faros tion memvole. La historio de la batalo de la mozambika popolo pruvas, ke nur per ekpreno de armiloj oni povos forpeli la portugala koloniistojn ĝisdente armitajn.” Post studo de la brila verko de Prezidanto Maŭ *Problemoj de Milito kaj Strategio*, iu gerila taĉmentestro diris, ke oni devas havi nenian ajn iluzion pri la imperiistoj kaj ĉiuj reaktuloj, nek fari kun ili “pacan intertraktadon” laŭ la “persvado” de iuj personoj. Oni devas, kiel instruas Prezidanto Maŭ, konduki la armitan batalon ĝis la fino.

### LA INSTRUO DE PREZIDANTO MAŬ ESTAS GRANDA VERO

Mtumbe, gerila batalanto de kamparana deveno, estis plurfoje forkaptita de portugala koloniistoj por fari devigan laboron. Li havas ekstreman malamon kontraŭ la koloniistoj. Tamen li ne havis sufiĉan memfidon en batalo pro manko de ĝusta kono pri la rilatoj inter armiloj kaj homoj. Poste, li komencis studi verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj ricevis profundan instruon el la diro de Prezidanto Maŭ, ke **“armiloj estas grava faktoro en milito, sed ne la decida faktoro; tio, kio decidas, estas homoj sed ne objektoj.”** Retrorigardante la historion de ilia batalo, li diris kun profunda ekkompreno: “Tiu ĉi brila penso de Prezidanto Maŭ estas granda vero.” “Kvankam la portugala kolonia armeo disponas aviadilojn kaj kanojn, tamen ili ĉiam malvenkas en batalo. Ni ne posedas pezajn armilojn, sed ni akiris unu venkon post alia, kaj nia vicaro fariĝas ĉiam pli granda. El tio estas videble, ke tio, kio decidas la venkon aŭ malvenkon en milito, estas homoj sed ne objektoj.” De tiam, kun plifortigita fido pri venko super la malamikoj, li tre brave batalas sur la batalejo, kaj cetere donas pli grandan atenton al studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Li diris: “Nur tiuj armitaj per la penso de Maŭ Zedong povas plej kuraĝe uzi kaj plene utiligi la armilojn.”

### SINAPOGO SUR KAJ MOBILIZO DE AMASOJ

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“La revolucia milito estas milito de la amasoj”**, la mozam-



*Mozambika gerilano studas verkon de Prezidanto Maŭ pri milito.*

bikaj porliberaj batalantoj donas grandan atenton al mobilizo de la amasoj kaj sinapogo sur ili, kaj tiel trovas subtenon kaj helpon ĉe la amasoj. Prezidanto Maŭ instruas: **“Kio estas efektiva fera bastiono? Ĝi estas la amasoj, amasoj el milionoj kaj milionoj da homoj, kiuj kore kaj sincere subtenas la revolucion.”** En bataloj, la mozambikaj porliberaj batalantoj komprenis el sia propra sperto ke tiu instruo de Prezidanto Maŭ estas ilia plej akra armilo por venki la malamikojn. Gerila kadro Andunrina diris al la batalantoj: “Por batali ni devas nin apogi sur la amasoj kaj plene mobilizi ilin. Ni devas ĉiam resti kune kun la amasoj, kiel Prezidanto Maŭ instruas al ni.”

La mozambika laboranta popolo longe subpremata de la portugala koloniismo rigardas la gerilajn batalantojn kiel siajn intimojn, agas kiel gvidisto por ili, transdonas informojn kaj provizas ilin per vestoj kaj manĝaĵoj. Ĉio ĉi tio profunde kortuŝis la

gerilajn batalantojn. La batalanto Laur diris: "Ni devas ami kaj respekti la popolon. Sen la unuiĝo inter la armeo kaj la popolo, nia afero fiaskos; sen la subteno de la popolo ni ne povas akiri venkon." Alia batalanto diris: "Ni devas ne nur nin apogi sur la subprematajn popolamasojn, sed ankaŭ mobilizi kaj eduki ilin, ĉar ili povas plej facile akcepti la veron pri revolucio kaj plej firme subtenas la liberigan batalon." En tia maniero, la gerilaj batalantoj kreive studas kaj kreive aplikas la penson de Prezidanto Maŭ.

### ELLERNO DE LA STRATEGIO KAJ TAKTIKO DE POPOLA MILITO

La mozambikaj gerilaj batalantoj senlace studas kaj aplikas la strategion kaj taktikon de Prezidanto Maŭ rilate al popola milito. Lerninte la penson de Prezidanto Maŭ pri koncentro de supera forto por fari eksterman batalon, iu roto foje ekstermis preskaŭ cent malamikojn en unu batalo. En resumado de la sperto de tiu batalo, la batalantoj diris: "Ni nepre devas fari eksterman batalon. Ni devas koncentri, kiel instruas Prezidanto Maŭ, absolute superan forton por ekstermi la malamikajn fortojn ĉiujn aparte, kaj tiel ni certe povas efike neniigi la malamikojn kaj akiri venkojn." Post studo de la taktika penso de Prezidanto Maŭ pri proksima batalo kaj nokta batalo, ilia batalforto konstante altiĝas. En marto ĉijare, en surprizatako al iu malamika apogpunkto, taĉmento da gerilaj batalantoj brave luktis, ruinigis la apogpunkton, ekstermis preskaŭ tutan roton da portugalaj koloniaj armeanoj kaj militakiris multe da

armiloj kaj municio. Iu gerila kadro Fukas diris: "Ni nepre devas batali laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, plene disvolvante niajn specialajn kvalitojn, sturmi kuraĝe kaj fari proksiman batalon kaj noktan batalon, donante al la malamikoj neatenditan baton kaj ekstermante ilin komplete."

### LA PENSO DE MAŬ ZEDONG ESTAS BRILA LAMPO VOJMONTRA

El sia travivaĝo, la mozambikaj porliberaj batalantoj profunde ekkomprenis ke la penso de Maŭ Zedong estas potenca armilo por venki la malamikon. Tial, ĉiam pli multe da batalantoj studas serioze verkojn de Prezidanto Maŭ. Unu el tiuj batalantoj nomata Boqos diris kun elkora sento: "La penso de Maŭ Zedong estas spirita atombombo. La verkoj de Prezidanto Maŭ konigas nin pri la direkto de nia batalo por liberiĝo. Ni por ĉiam amos la trezorajn librojn de Prezidanto Maŭ." Rememorante pri farita batalo iu gerila kadro diris: "Ĉiufoje, kiam ni renkontis malfacilojn en la fronto, ni malfermis, same kiel la batalantoj en la ĉina filmo *Tunela Batalo*, librojn de Prezidanto Maŭ. Liaj instruoj donis al ni neelĉerpeblan forton." Alia batalanto diris kun granda fervoro: "La granda penso de Maŭ Zedong estas brila lampo vojmontra. Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, ni mozambikaj porliberaj batalantoj neniam misorientos nin. Ni batalantoj en afrika ĝangalo ĉiam ligiĝas kun Prezidanto Maŭ koro kun koro." Li varme aklamis: "Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!" "Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!"

*Mozambikaj gerilanoj ekzercas sin milite por lertiĝi sin en ekstermo de malamikoj.*



# Negoco sub Bajonetoj

Komentisto de la Popola Ĵurnalo

**P**OST la okupo de Ĉeĥoslovakio per arme-ekspedo, la sovetunia reviziisma renegata kliko eskortis ĉeĥoslovakajn reviziismajn ĉefojn Dubĉek kaj lian kompanion al Moskvo por "intertraktado" kaj eljetis t. n. "Komunikon pri Sovetunia-Ĉeĥoslovaka Intertraktado" en la 27-a de aŭgusto. Tio estas rezulto de premo de la usona imperiismo sur la sovetuniajn reviziistojn kaj de intensigo de la usona-sovetunia tutgloba kontraŭrevolucia koluzio. Tio estas malpura negoco, kiun la sovetunia reviziisma renegata kliko devigis per bajonetoj la ĉeĥoslovakajn reviziisman renegatan klikon fari por sin savi el la nuna malfacila stato. Tio estas alia senhonta granda perfido de la ĉeĥoslovaka reviziisma renegata kliko. Tio estas tre mallerta trompado de la reviziismaj renegataj klikoj de Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio kun intenco fraŭdi la ĉeĥoslovakajn popolon, la sovetunian popolon kaj la popolojn de la tuta mondo.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"La registaroj de la imperiismaj landoj, kvankam ili sin okupas pri kontraŭrevoluciaj aktivadoj ĉiutage, tamen en deklaroj aŭ oficialaj dokumentoj ĉiam saturitaj aŭ almenaŭ spicitaj de humaneco, justeco kaj virteco neniam diras la veron."** La t.n. "Komuniko pri Sovetunia-Ĉeĥoslovaka Intertraktado" fabrikita de la sovetunia reviziisma renegata kliko, la bando da social-imperiistoj, ĝuste estas tipa imperiisma oficiala dokumento.

En tiu "komuniko" la sovetuniaj reviziistoj amasigis multajn belajn vortojn, kiaj respekto al "teritoria integreco", "neinterveno en internajn aferojn", "amikeco" kaj "solidareco". Vere ciniko ĝis ekstreco!

Vi ekspedis trupojn kun kelkcent mil soldatoj kaj okupis la tutan Ĉeĥoslovakion. Pri kia "teritoria integreco" vi ankoraŭ parolis!

Vi eskortis la partiajn kaj registarajn ĉefojn de Ĉeĥoslovakio al Moskvo kaj kreis marionetojn per bajonetoj. Ĉu tio ne estas "interveno en internajn aferojn"!

Viaj tankoj senbride kuris en Praha kaj viaj agresaj trupoj arbitre pafmortigis ĉeĥoslovakajn popolojn. Ĉu povas esti tia "amikeco" kaj "solidareco" en la mondo?!

La "komuniko" ripete babilis pri protekto de "intereso" de la "tuta socialisma komunumeco". La vera signifo de tiuj diablaj vortoj estas: konservi la koloniajn interesojn de la sovetunia reviziisma renegata kliko en la orienta Eŭropo. Vi rabas riĉaĵojn de tiuj landoj por la intereso de la "komunumeco"; vi atencas suverenecon de tiuj landoj por la intereso de la "komunumeco"; kiu aŭdacas kontraŭstari, vi eligas viajn tankojn kaj kanonojn kaj enirigas en ties teritorion, kaj tio estas dirita ankaŭ por la intereso de la "komunumeco". Ĉu tio ne estas la sama speco de la "komunumo de la libera mondo" de la usona imperiismo?!

La "komuniko" ankoraŭ diris, ke la sovetunia reviziismo retiros siajn trupojn nur post "normaliĝo de situacio" en Ĉeĥoslovakio. Rigardu, ĉu la usona imperiismo ne ankaŭ de tempo al tempo deklaris, ke la usonaj agresaj fortoj "morgaŭ revenos hejmen", tuj kiam "libereco" kaj "paco" estos sekuritaj en Vjetnamio? La usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo, la du plej grandaj imperiistoj, estas samaj unu al alia en tono kaj en senhonteco.

La sovetunia reviziisma renegata kliko faris utilan laboron en la t. n. "Komuniko pri la Sovetunia-Ĉeĥoslovaka Intertraktado", nome, ĝi malkaŝis per si mem serion da pompaj "motivoj" falsitan por sendi trupojn okupi Ĉeĥoslovakion. Ĉu vi tiam ne diris, ke la ĉeĥoslovakaj gvidantoj kun Dubĉek ĉe la kapo estas bando da "dekstraj reviziismaj elementoj"? Ĉu vi ne diris, ke rezulte de la "perfidaj agoj" de Dubĉek kaj liaj similaj "estiĝis reala minaco al la socialismaj atingoj de Ĉeĥoslovakio"? Ĉu vi ne diris, ke en la nomo de "defendo de la socialismo en Ĉeĥoslovakio", en la nomo de plenumo de la "supera internacia devo" vi ne povis ne ekspedi trupojn? Sed, nur post kelkaj tagoj, en la t. n. "komuniko" vi faris krutan turniĝon, esprimante "kompreniĝon kaj subtenon" al la starpunkto de la bando da gvidantoj estrataj de Dubĉek kaj diris ke la linio efektiva de Dubĉek kaj liaj similaj eliras el "plifortigo de la socialisma sistemo" "sur la bazo de marksism-leninismo". Tio ja estas bonega prezentado de vangfrapo per vi mem! El tio oni

povas vidi, ke la sovetunia reviziisma renegata kliko mem estas ĝenerala ĉefo de la “dekstraj reviziismaj elementoj”, la sovetunia reviziismo mem estas ĉefa radiko por entombigi la “socialismajn atingojn” en Ĉeĥoslovakio kaj ke la sovetunia reviziisma renegata kliko estas pioniro en kapitulaco al la usona imperiismo kaj en perfido al la proletara “internaciisma devo”. La “motivoj” de la sovetunia reviziisma renegata kliko por sendi trupojn okupi Ĉeĥoslovakion estas granda mensogo de la kapo ĝis la piedoj. La vortoj kia “defendo de socialismo” k. s. estas nenio alia ol pronomoj de la de ĝi antaŭenpuŝataj social-imperiismo kaj social-faŝismo.

La t. n. “Komuniko pri Sovetunia-Ĉeĥoslovaka Intertraktado” spegulis la senprecedence konsternan kaj izolatan staton de la sovetunia reviziisma renegata kliko post ekspedo de la trupoj en Ĉeĥoslovakion. Ĝi antaŭe imagis, ke post okupo de Ĉeĥoslovakio ĝi povos agi laŭ sia bontrovo kaj stabiligi sian dominantan pozicion en la tuta moderna reviziisma kliko. Kiu scias, ke la laŭdezira kalkulo forvaporigis. La agresaj agoj de la sovetunia reviziismo vekis reziston de la ĉeĥoslovaka popolo kaj renkontis oponon de la sovetunia popolo kaj kondamnon de la tutmondaj revoluciaj popoloj. Samtempe, la tuta moderna reviziisma kliko falis pro tio en ĥaoson, eĉ iuj sekvantoj de la sovetunia reviziismo senĉese elverŝis senprecedencajn plendojn. La sovetunia reviziisma renegata kliko sin trovas en dilemo en Ĉeĥoslovakio. Ĝi povas nek retiri, nek restigi tie siajn trupojn. Senefike uzinte ĉiajn rimedojn, ĝi ludis tiun farson kun helpo de bajonetoj.

Tiu ĉi moskva intertraktado estas farita sub interveno de la usona imperiismo kaj konsista parto de intensigo de la tutgloba koluzio inter Usono kaj Sovetunio. Ĉe la ĉeĥoslovaka problemo la sovetunia reviziismo kaj la usona imperiismo luktas unu kontraŭ la alia kaj samtempe komplotas unu kun la alia. La usona imperiismo unuflanke silente konsentis al la sovetunia reviziismo sendi trupojn en Ĉeĥoslovakion, kaj aliflanke donis premon al ĝi postulante ke tiu konsideru la interesojn de la tuto en la uson-sovetunia rilato kiel la plej gravan aferon. La ĉefoj de la usona imperiismo Johnson kaj Rusk publike postulis ke la sovetunia reviziismo tenu sin en “prudento”, “pensu foje-refoje” kaj ne alprenu “ekscesajn rimedojn” kontraŭ Dubĉek-kliko. Plene kompreninte tion, la sovetunia reviziisma renegata kliko urĝeme deziris trovi rimedojn por stabiligi la situacion en Ĉeĥoslovakio. Oni povas klare

vidi, ke tiel la usona imperiismo kiel la sovetunia reviziisma social-imperiismo ĉiuj ludas potencan politikon prenante Ĉeĥoslovakion kiel markon en la politika marĉando. Ambaŭ ili estas la plej ferocaj malamikoj de la ĉeĥoslovaka popolo.

Dekomence la ĉeĥoslovaka reviziisma renegata kliko estrata de Dubĉek publike alvokis la popolon ne fari reziston kontraŭ la armita invado de la sovetunia reviziismo, kaj nun kapitulacis sub la bajonetoj de la sovetunia reviziismo kaj akceptis kondiĉojn, kiuj perdis la ŝtatan suverenecon kaj alportis humilecon al la lando. Ili foje-refoje “alvokis” la ĉeĥoslovakian popolon teni “trankvilecon” kaj “diskreton”, “fari maksimumajn penojn por preventi sennecesan sangverŝadon” kaj absolute ne “kolizii kun trupoj ekipitaj per plej moderna tekniko” ktp. Unuvorte, ili postulis ke la popolo volonte estu sklavo de la faŝismaj okupantaj trupoj de la sovetunia reviziismo. Tio nude malkovris la malnoblan lakean fizionomion de tiu bando da naciperfiduloj. La reviziisma renegata kliko estas ne nur perfiduloj al proletaro, sed ankaŭ sendube perfiduloj de nacio en kazo de agreso de imperiismo. Tio estas fera fakto antaŭ oni.

La ĉeĥoslovaka incidento edukis la tutmondajn popolojn. Ĝi ebligis al la sovetunia popolo, la ĉeĥoslovaka popolo kaj la popoloj de la landoj kie la modernaj reviziismaj klikoj tenas regpotencon pliklare vidi la reakcian naturon de la moderna reviziisma kliko, ankaŭ ebligis al la tutmondaj popoloj pluapaŝe koni la reakciecon kaj putrecon de la moderna reviziismo. Nun, la ĉeĥoslovaka popolo plifortigas sian revolucionan batalon kontraŭ la moderna reviziismo por sin liberigi el sub okupo kaj kontrolo de la sovetunia reviziisma renegata kliko, oponi minacon kaj intervenon de la usona imperiismo kaj renversi la reakcian regadon de la ĉeĥoslovaka reviziisma renegata kliko. Vigle disvolviĝas la batalo de la tutmondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj la sovetunia moderna reviziismo. La ĉina popolo firme staras ĉe la flanko de la revolucia popolo de Ĉeĥoslovakio, de la revolucia popolo de Sovetunio kaj de la revoluciaj popoloj tra la tuta mondo. Ni firme kredas ke certe venkos la revoluciaj bataloj de la ĉeĥoslovaka popolo, la sovetunia popolo kaj la popoloj de la tuta mondo; ne tro malproksimaj estos la tagoj, en kiuj la imperiismo, moderna reviziismo kaj reakciuloj de diversaj landoj komplete disfalos, kaj ĉiuj diabloj kaj demonoj estos plene neniigitaj.

# La Sovetunia Reviziismo Plirapidigas

## Siajn Paŝojn al Kapitalismo

**L**A sovetunia reviziisma renegata kliko, internacie, intensigas sian komploton kun la usona imperiismo kaj plie kapitulacas al ĝi surgenue, kaj, enlande, rapidigas siajn paŝojn al la kapitalisma restaŭro, tiel ke la unua socialisma lando en la mondo, kiun fondis persone Lenin kaj Stalin, estas maldece taŭzita tute netolereble. El la sekvantaj kelkaj pecoj de la krimo de kapitalisma restaŭro fare de la reviziisma renegata kliko de Sovetunio, oni povas vidi, kiel malproksimen jam glitis ili laŭ la vojo de la kapitalisma restaŭro.

### VASTA FEKUNDA TERO STERILIGIS

Depost kiam la sovetunia reviziisma kliko uzurpis al si la regpotencon, ĝi krude forstrekis la aranĝojn, kiujn oni faris dum la tempo de Stalin por protekti la grundon kaj plantaĵojn, kiaj flegado de arbaroj, protektado de agroj, la sistemo de alterna kreskigo de herboj kaj plantoj en agrikulturo, kaj tiel malfekundigis vastan areon.

La sovetunia reviziisma gazeto *Moskvo* malkaŝis, ke de la lastaj jaroj vasta kulturata areo de Sovetunio suferas seriozan korodadon de akvo kaj vento. Sole en la eŭropa parto de Sovetunio jam ĉirkaŭ 50,000,000 hektaroj da agro estas koroditaj de akvo. En Voroneĵ, Rostov, Saratov, Kursk kaj aliaj regionoj de Rusio, ĉiujare estas “forlavitaj” miloj da hektaroj da kulturata tero. En Ukraino, triono de la tero uzata por agrikulturo estas en dekvalitiĝado. En Armenio, troviĝas 100,000 hektaroj da tero, kies kulturebla tavolo estas forlavita. En Azerbajĝanio, 40 procentoj de la tero suferas korodon de akvo. Iuj kolĥozoj en Georgio devas “transloĝiĝi” pro tio, ke ilia tuta kulturebla tero estas difektita. Kaŭze de erozio, la perditaj azoto, fosforo kaj kalio de la kulturata tero en multaj agrikulturaj regionoj estas pli multaj ol la sterko donita al ĝi.

En Kazakstano, kiun la sovetunia reviziismo bombaste gloris kiel la ĉefan kulturebligatan regionon, ĉiujare okazas sabloŝtormo, kies atakon suferas jam 20,000,000 hektaroj da kulturata tero.

Erozio de la tero preskaŭ tuŝas la tutan landon de Sovetunio kaj la perdo kaŭzita de ĝi en ĉiu jaro atingas 4,000 milionojn da rubloj.

### BLOVAS VENTO DE PROFITĈASO KAJ MALVERSACIO ĈE LA PRIVILEGIA TAVOLO

Inter la plenmano da privilegiuloj de Sovetunio blovas la vento de profitĉaso kaj malversacio. Falsigo de salajra listo per enŝovo de fantomaj nomoj estas ilia nova kreaĵo por ekspluati la laborantan popolon.

Laŭ la malkaŝo de la soveta gazeto *Komsomolskaja Pravda*, Krivenko — estro de la plantoprotekta stacio de Doneck — falsis la nombron de anoj de laborbrigado kaj postulis la brigadanojn plenumi ĉiumonate la taskon, kiun devus fari la neekzistantaj fantomaj anoj, kiuj havas sian nomon en la salajrolisto. En iu brigado nomata Malevani, el la dudek naŭ nomoj en salajra listo dekkvin estas tute fikciaj. Alia brigado nomata Kostilev havas sub si du “kolektivojn” konsistantajn tute el fantomoj. La brigadanoj devis multe ŝviti por plenumi la taskojn de siaj nur nominale ekzistantaj kolegoj, kaj la gajnita mono daŭre fluadis en la poŝon de la estro de la plantoprotekta stacio.

La sovetunia ĵurnalo *Izvestia* malkaŝis, ke la estro de pentrarta sekcio de la Ukraina Socia Reklama Kompanio Gerasikin estas alia lertulo en la supre menciita artifiko. Li metis la nomon de la hejtistino de sia sekcio en la liston de pentristoj. Ĉiufoje, kiam la pentristoj ricevis salajron, “Gerasikin subskribis por ŝi kaj metis la monon en sian poŝon”.

Krome, Gerasikin ankaŭ trovis por si kunlaborantojn por subskribado. Ekzemple, li trovis iun intendanton de mezlernejo, kiu “ŝatas gajni krom-enspezon”, kaj al kiu li rekte diris sian proponon sen ĉirkaŭfrazo.

Jen ilia “bela” dialogo:

— Estas bezonata pentristo... pro laboro por-tempa... kaj mia penso tuj direktiĝis al vi, diris Gerasikin.

— Kia pentristo mi estas? — kun miro diris la intendanto — neniam mi prenis penikon.

— Ne necesas preni penikon.

— Tiam, kion mi devas fari?

— Subskribi ricevatestilon.

— Tion mi povas, sed kiom mi ricevos?

— Dek rublojn.

— Tro malalte vi difinas la koston de mia subskribo.

Gerasikin ekkoleris en si, sed li retenis la koleron kaj diris: “Dek kvin rubloj devas jam sufiĉi.”

— Do, tiel estu.

Ilia negoco efektiviĝis. La intendanto fariĝis “viva maŝino” por subskribi en la salajra listo kaj por tio ricevis 15 rublojn en ĉiu duonmonato. Kaj Gerasikin ĉiumonate ricevis la tuton de kroma salajro de 140-170 rubloj, el kiuj li donis tridek al la subskribinto.

## **GRENO, VIANDO KAJ LEGOMOJ DEPENDAS DE IMPORTADO**

La sovetunia reviziisma kliko plenenergie efektivigas la kapitalisman restaŭron en la kamparo kaj tio alportis al la agrikultura produkto ekstreme seriozan rezulton. Por trompi la popolon kaj ornami la montrofenestron ili fabrikis amason da senbazaj ciferoj, fanfaronante ke “la sovetunia popolo manĝas kaj vestas sin multe pli bone ol antaŭe”. Sed kia estas la realeco en Sovetunio?

La reviziisma renegata kliko de Sovetunio estas vere nekuraceblaj malŝparemaj filoj. Ili jam antaŭlonge forkonsumis la rezervajn grenojn akumultajn dum la periodo de Stalin kaj de la jaro 1963 devas sin vivteni per vendado de sia ora rezervo kaj aĉetado de tritiko en la okcidenta merkato. La grena krizo pli serioziĝas tago post tago kaj ekzistas simila manko de aliaj agrikulturaj kaj brutaj produktaĵoj. Reduktiĝas ankaŭ la produktokvanto de terpomo, kiu estas grava manĝaĵo de la sovetunia popolo. La kotona produkto estas ne kuraĝiga; la plano de vianda produkto restas malproksima de ĝia plenumiĝo; akre mankas eĉ ordinaraĵoj legomoj, kia tomato. La sovetuniaj reviziistoj devas importi ajlon el la Unuiĝinta Araba Respubliko, fabon el Bulgario kaj tomaton el orienta Eŭropo por ornami legombretojn.

Apud la manko de agrikulturaj produktaĵoj, ankaŭ la provizado de ĉiutagaj vivbezonaĵoj devas esti subtenata per importado. La ministro de komerco kun eksterlando de la sovetunia reviziismo ne povas ne konfesi, ke en la lastaj jaroj la kvanto de importitaj vestoj kreskis per 46 obloj kaj tiu de

ŝuoj per 23 obloj. La sovetunia reviziisma kliko cetero kontraktis kun Britio, Okcidenta Germanio, Ja panio, Italio, Belgio, Nederlando, Svedio, Finnlando kaj aliaj kapitalismaj landoj por importi diversajn ĉiutagajn konsumaĵojn. Ĉu ĉiuj tiuj faktoj ne estas granda moko al la distrumpetita fanfaronado de la sovetunia reviziisma kliko, ke “la sovetunia popolo manĝas kaj vestas sin multe pli bone ol antaŭe”!

Prezidanto Maŭ montris: “Kvankam la gvidantecon de la Partio kaj ŝtato de Sovetunio estas nun uzurpita de reviziistoj, tamen, mi konsilas, ke niaj kamaradoj firme kreu, ke la vastaj amasoj de popolo kaj partiaj membroj kaj kadroj de Sovetunio estas bonaj kaj deziras revolucion, kaj ke la regado de reviziismo ne longe daŭros.” Sub la brilo de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, la sovetunia popolo, kiu vivis longe sub la gvidado de Lenin kaj Stalin, certe forbalaos la nubojn de sur la ĉielo, dispelos la malvarman fluon kaj sendos tiujn demonojn kaj diablojn, la sovetuniajn reviziismajn perfidulojn, al la tribunalo de la historio.

## **PORDO MALFERMITA POR OKCIDENTAJ “TURISTOJ”**

La renegata kliko de la sovetunia reviziismo pli kaj pli senkaŝe utiligas “la internacian turismon” por senbride alvenigi diversspecajn “turistojn” de la okcidenta kapitalisma mondo kaj lasas ilin disvastigi la cinikan, diboĉan vivmanieron de la Okcidento sur la lando de Sovetunio por veneni la sovetunian popolon.

Frue antaŭe, post kiam Ĥruŝĉov uzurpis la partian kaj registaran gvidantecon de Sovetunio, la reviziisma kliko de Sovetunio jam utiligis “la internacian turismon” en servo al sia kapitulaco al imperiismo internacie kaj al restarigo de kapitalismo enlande, sub la ŝildo de “paca kunekzisto” kaj “kultura interŝanĝo”. Rezulte de la klopodado de la Ĥruŝĉova reviziismo, “turistoj” el okcidentaj kapitalismaj landoj komencis amase enflui en Sovetunion. Post sia sursceniĝo, la novaj reviziismaj gvidantoj de Sovetunio ne nur heredis tiun talaron de Ĥruŝĉov, sed iris eĉ pli malproksimen. En la pasintaj kelkaj jaroj, okcidentaj “turistoj” venantaj al Sovetunio multiĝis en obloj. La 15-an de julio en la kuranta jaro, kiel alia paŝo de pli intima komploto inter la sovetunia reviziismo kaj usona imperiismo, ilia rekta aviadlinio inter Novjorko kaj Moskvo oficiale malfermiĝis al trafiko. La oficejo de la aviada kompanio de la sovetunia

reviziismo en Novjorko speciale aperigis tutpaĝan reklamon sur usonaj ĵurnaloj, por senhonte promesi ke plej bonaj servoj estos liverataj al “vojaĝantoj” de la usona imperiismo.

Por ke okcidentaj “turistoj” havu vivon “novan, interesan kaj plenan de ekscitoj kaj laŭvolaj ĝuoj”, la sovetunia reviziismo speciale aranĝas putrajn, dekadencajn amuzprogramojn el multnombraj, diversspecaj eroj kaj eĉ organizas ilin “ĉasi ursojn en Siberio”, “kapti sovaĝajn kaprojn en Azerbajĝanio”, lasante ilin libere agi sur la tero de Sovetunio. Tiu ĉi faro de la renegata kliko de la sovetunia reviziismo estas grandega insulto al la sovetunia popolo.

Kun la svarma alfluo de “turistoj” en Sovetunion el Usono kaj aliaj okcidentaj landoj, putraj kaj dekadencaj “usona civilizo” kaj “okcidenta kulturo” senbare disvastiĝas en Sovetunio. Iuj “turistoj”, sub la ŝildo de “vojaĝo”, faras eĉ kontrabandojn, ŝtelojn, komercon de mono, spionadon kaj sekretajn intrigojn kaj detruojn. Sub la malbona influo de la “okcidenta kulturo”, multaj sovetuniaj gejunuloj ekportas usonajn vestojn de strangaj fasonoj, kaj iuj junuloj eĉ surhavas longajn harojn en maniero pli kaj pli dekadenca. Nuntempe, multaj burĝaraj aferoj furoraj en la Okcidento tre rapide enportiĝas en Sovetunion kaj venenas la junan generacion.

---

## Malgrandaj Herooj de Suda Vjetnamio

### BRAVA BOVKNABO

La suno subiris; post tuttaga diligenta laboro, hejmen revenis la kamparanoj de la liberigita areo de Huong Lam en la provinco Thua Thien de suda Vjetnamio. Sur la kampoj restis nur la dekjara bovknabo Uy, kiu malrapide pelis sian bovon al la vilaĝo. Subite aŭdiĝis motor-bruo en la aero, li tuj vidis sep helikopterojn ŝtele alflugantaj. Uy sciis ke en tiuj aeroplanoj estas speciala taĉmento de la malamiko, kiu intencas enterigi minojn en la kampoj post hejmeniro de la kamparanoj por mortigi la popolanojn.

La malamikaj aviadiloj rondflugis ŝtele super maizaj kampoj, intencante alteriĝi. Uy estis maltrankvila kaj pensis, ke estos tro malfrue, se li iros raporti al la onkloj de la partizana taĉmento.

“Ekstermu ilin!” firme pugnigante sian manon, Uy decidis en si. Kun la fusilo ricevita de la onkloj de la partizana taĉmento, li kuris en proksiman ŝirmejon destinitan por pafi kontraŭ aeroplanojn kaj aplombe rigardis la maŝinojn de la malamiko.

Unu helikoptero surteriĝis dek metrojn for de lia kaŝejo. Apenaŭ kelkaj malamikoj montris sian kapon

ĉe la fenestro, la kugloj de Uy jam trafis kun malamo la maŝinon, kaj tiu tuj ekbrulis. Ekplodadis ankaŭ la municio en ĝi. Trovante la situacion nebona, la aliaj 6 maŝinoj haste eskapis.

Iom poste, Uy saltis el sia ŝirmejo kaj rapide kuris al la bruligita helikoptero; tie li trovis ke la armiloj en ĝi difektiĝis de la brulado kaj ekplodado, ankoraŭ restis nur unu kesto kun 200 kartoĉoj. Kun ĝojo Uy ŝultre portis ĝin al la onkloj de la partizana taĉmento en la vilaĝo.

Ĉiuj en la vilaĝo laŭdis lin kun admiro: “Uy ja estas vere senkompara heroeto. Je la unua fojo li jam pafis la malamikan aeroplanon tiel trafe kaj forte.”

### SAGACA KURIERETO

Iufoje, malgranda kurierino Khac gvidis kelkajn kadrojn trairi iun montan arbaron kun komplika topografio, jen surgrimpante monton, jen vadante en akvo. Kvazaŭ vigla kaj sagaca sciuro, Khac estis trairinta ĉiujn primitivajn arbarojn en la okcidenta Thua Thien. Ŝi bone konas ĉiun monton kaj ĉiun riveron; en ŝia kapo estas firme notitaj la profundeco de ĉiu rivero kaj pozicio de ĉiu rimarkinda arbego apud vojo.

“Onkloj, ni tuj transpasos riveron!” Khac diris turnante sin al la malantaŭe irantaj kadroj kaj tuj ekvadis en la rivero. Jen, ŝi vidis sur la transa bordo amason da pupaj armeanoj en nombro de 30-40. Ankaŭ la pupaj armeanoj jam vidis Khac.


En la kapo de Khac trakuris ideo: “Mi devas nepre ŝirmi la onklojn!” Kriinte alarmon, ŝi tuj sin subakvigis kaj naĝis returne.

Aŭdinte la alarmon de Khac pri malamikoj, la kadroj rapide sin kaŝis por batali kontraŭ la malamikoj. Kiam la malamikoj vidis Khac kaŝi sin sub la akvo, ili freneze kriaĉis: “Estas knabino, kaptu ŝin viva.”

Kvankam Khac jam tre laciĝis post reveno al la bordo, tamen ŝi estis plena de malamo kontraŭ la malamikoj. Ŝi pensis en si: “Eĉ se mi devos morti, mi ne lasos la malamikojn reiri vivaj.” Ŝi fluge kuris al la direkto, kie la partizana taĉmento faris amason da enfalosaĵoj. Tiam la pupaj armeanoj jam transnaĝis la riveron. Jen aŭdiĝis kelkaj ve-krioj, la kvin antaŭkurentaj malamikoj falis en fosaĵojn, inter kiuj unu tuj mortis, kaj la aliaj grave vundiĝis. Je tio konsterniĝis la ceteraj pupaj armeanoj; ili ne kuraĝis plu antaŭen iri kaj forkuris returne.



*Pakistanaj amikoj legas kaj aĉetas la verkon de Prezidanto Maŭ Pri Longdaŭra Milito en la urdua lingvo.*




## VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ PRI MILITAJ AFEROJ VASTE DISTRI-BUIĜAS TRA LA TUTA MONDO

**K**UN la pli profunda disvolviĝo de la revoluciaj armitaj bataloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, la revoluciaj popoloj de diversaj landoj urĝe bezonas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj por ke ili povu apliki la militajn teoriojn de Prezidanto Maŭ en sia revolucia praktiko. Responde al la postulo de la diverslandaj revoluciaj popoloj, la koncernaj eldona kaj distribua institucioj en nia lando grandkvante eldonas kaj distribuas la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ pri popola milito. Laŭ nekompleta statistiko ĝis la fino de julio de la kuranta jaro, dum la du jaroj post la komenciĝo de la granda proletara kultura revolucio en nia lando, estis

grandkvante distribuitaj en pli ol 130 landoj kaj regionoj en la kvin kontinentoj la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong pri Militaj Aferoj*, *Prezidanto Maŭ Zedong pri Popola Milito* kaj diversaj verkoj de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj en kolektoj aŭ en apartaj broŝuroj. La totala distribuita kvanto de tiuj verkoj de Prezidanto Maŭ dum tiuj du jaroj multe superis tiun dum la dekelkaj jaroj antaŭ la granda proletara kultura revolucio. Interalie la distribuita kvanto de *Prezidanto Maŭ Zedong pri Popola Milito* atingis pli ol 350,000 ekzemplerojn.

En la daŭro de unu jaro ĵus pasinta, estis aperigitaj plie novaj eldonoj en fremdaj lingvoj. Krom en la angla, franca kaj rusa lingvoj, la *Elektitaj*



Prezidanto Maŭ pri Popola Milito, eldonita de la Komunista Partio de Bolivio.

*Verkoj de Maŭ Zedong pri Militaj Aferoj* estis eldonitaj ankaŭ en la indonezia, hispana kaj taja lingvoj. Krome, eldoniĝis kaj distribuiĝas la *Ses Verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong pri Militaj Aferoj* en la birma kaj taja lingvoj, kaj *Prezidanto Maŭ Zedong pri Popola Milito* en 17 lingvoj, inkluzive de Esperanto, la birma, indonezia, hindia, taja, vjetnama, araba, angla, franca, rusa, itala, germana, japana, hispana, portugala k.a. La jam eldonitaj verkoj de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj en apartaj broŝuroj konsistas el 17 titoloj, inter kiuj 7 inkluzive de *La Batalo en Gingga-montaro* kaj *Koncentro de Superaj Fortoj por Ekstermi la Malamikojn Ĉiujn Aparte* nove aperis dum la granda proletara kultura revolucio. Parto de la verkoj jam aperigitaj kiel apartaj broŝuroj ekhavis novajn eldonojn en fremdaj lingvoj, ekzemple, la *Problemoj de Milito kaj Strategio* nun estas eldonita ankaŭ en la taja, araba, ŝahilia, persa kaj rusa lingvoj. *Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon* nun

estas aperigita en 18 lingvoj, kaj *Kial la Ruĝa Regpotenco de Ĉinio Povas Ekzisti?* en 17 lingvoj. Por faciligi al la legantoj la kunportadon kaj studon, en la kuranta jaro aperis en poŝformato la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong pri Militaj Aferoj* (en la angla kaj indonezia lingvoj). Tiuj poŝformataj eldonoj estas oportune kaj elegante aranĝitaj; ili enhavas 29 verkojn de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj, kaj trovas varmegan akcepton ĉe diverslandaj revoluciaj popoloj.

La revoluciaj popoloj de multaj landoj ankaŭ mem tradukis kaj eldonis grandkvante verkojn de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj. Laŭ nekompleta statistiko ĝis junio de la kuranta jaro, jam aperis 130 eldonoj de verkoj de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj en 32 lingvoj kaj 38 landoj. La *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong pri Militaj Aferoj* estas tradukita kaj eldonita de fremdaj landoj en araba, itala kaj greka lingvoj; *Prezidanto Maŭ Zedong pri Popola Milito* en la singala, bengala, itala, telugua, angla kaj sveda, sume ses lingvoj. Tiuj brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ, kiaj *Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon*, *Pri Longdaŭra Milito*, *Problemoj de Strategio en Ĉina Revolucia Milito*, *Problemoj de Strategio en Kontraŭ-*

*japana Gerila Milito*, *Problemoj de Milito kaj Strategio* kaj *Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio*, estas pli vaste tradukitaj kaj eldonitaj de diverslandaj revoluciaj popoloj en diversaj lingvoj. En Hindio, Japanio, Grekio, Birmo kaj Italio, almenaŭ po sep titoloj el la verkoj de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj estas tradukitaj kaj eldonitaj, kaj en iuj el ili ĝis pli ol dek. En Laoso, Palestino, Kongolando(K.), Zimbabve, Angolo kaj kelkaj landoj en Latinameriko, kie estas kondukataj revoluciaj armitaj bataloj, la armeoj, gerilaj taĉmentoj kaj revoluciaj amasoj ĉiurimede kon-

*Patriotaj laosaj armeanoj kaj civiluloj batalantaj kontraŭ la usona imperiismo por savi sian patrolandon studas verkojn de Prezidanto Maŭ por ĉerpi el ili senlimajn saĝon kaj forton.*



# VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG

(Esperanta eldono)

Eldonita ankaŭ en la lingvoj albana, araba, bengala, birma, bulgara, ĉeĥa, angla, franca, germana, haŭsa, hindia, hungara, indonezia, itala, japana, korea, laosa, mongola, nepala, norvega, persa, pola, portugala, rumana, rusa, serba, hispana, ŝahilia, tamila, taja, urdua kaj vjetnama.

**358 paĝoj**      **En poŝformato de 13×9 cm.**  
**kun ruĝa plasta kovrilo**

Eldonis: **Fremdlingva Eldonejo**, Pekino, Ĉinio

Distribuas: **Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)**, Pekino, Ĉinio

Haveblaj ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe Sekcio por Poŝta  
Mendo, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio.

keris multajn malfacilojn, tradukis nacilingven verkojn de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj kaj eldonis ilin multoblige aŭ simple manskribe, por ilin studi.

La vastaj revoluciaj popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, kiuj nun batalas kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj de diversaj landoj, entuziasme aklamas la disvastigon de la verkoj de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj kaj serioze studas kaj aplikas la militajn teoriojn de Prezidanto Maŭ. Ili alte laŭdas la teoriojn de

Prezidanto Maŭ pri popola milito kiel la “plen-ampleksan, sisteman kaj plej kompletan militan sciencon de marksism-leninismo”, kiu “havas grandan, universalan signifon kaj montras por la subpremataj popoloj de la tuta mondo, precipe de Azio, Afriko kaj Latinameriko, la solan, irendan vojon en la batalo por liberiĝo.”

La verkoj de Prezidanto Maŭ pri militaj aferoj instruas kaj kuraĝigas la revoluciajn popolojn de la mondo al ekpreno de armiloj kaj suriro de la vojo de sinliberigo per si mem.

Kara amiko:

Bonan sanon. Ni kun granda ĝojo ricevis vian alian leteron antaŭ la nova jaro. Dankon pro via gratulo al nia redakcio.

La 9-a de decembro de la kuranta jaro estas la 29-a datreveno de la surskribo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ al la "Jan-an-a Esperantisto". La surskribo estas: "Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucian, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata." La brila surskribo de Prezidanto Maŭ ne nur montris direkton de marŝo de esperanta laboro por la ĉinaj revoluciaj esperantistoj, sed ankaŭ, kiel multaj legantoj skribis al ni, "montris direkton por la esperantistoj de la tuta mondo kaj estas brila vojmontra lampo por la esperanta laboro".

La surskribo de Prezidanto Maŭ instruas nin: Oni devas preni


Esperanton kiel batalan armilon, pere de ĝi disvastigi marksism-leninismon al la revoluciaj popoloj de la tuta mondo, interŝanĝi sperton de revolucio, subteni kaj akceli la batalon de la subpremataj nacioj kaj popoloj por nacia sendependeco, popoldemokratio kaj socialismo, kaj la batalon por defendo de la mondopaco. Kaj tiel, Esperanto ne nur povas esti lernata, sed ankaŭ devas esti lernata. Jen estas la unika celo de la ĉinaj revoluciaj esperantistoj en lerno kaj apliko de Esperanto.

La revolucio postulas de ni tion. Estas klare por multaj amikoj: Nun ni situas en la historia epoko en kiu kapitalismo kaj imperiismo de la tuta mondo iras al pereco kaj socialismo kaj popoldemokratio de la tuta mondo iras al venko, kaj la plej urĝa tasko alfrontata de la tutmondaj popoloj estas batali por la venko de socialismo tra la tuta mondo. En la okuloj de la revoluciaj esperantistoj de nia lando, Esperanto, kiel internacia helpa lingvo,

ne perdos sian valoron de ekzisto nur tiam, kiam ĝi servas al la batalo. Samtempe, nur tra la uzo de milionoj da homoj en tiu batalo, la lingvo povos esti pliriĉigita, pliperfektigita kaj prospera.

Tial, ekzistante disde la liberiga batalo de la subpremataj nacioj kaj popoloj, disde la batalo por la venko de socialismo tra la tuta mondo, Esperanto ne havas perspektivon.

Kara amiko, vidu, ĉu ne estas tia la fakto? Esperanto servas se ne al la politiko de la proletaro, do certe al la burĝaro. Ekde la naskiĝo de Esperanto, ankaŭ la burĝaro energie uzas Esperanton por firmigi la malnovan reĝimon de kapitalismo. Tenante "Esperanto estas neŭtrala lingvo" kiel ŝildon, ili unuflanke bojkotas kaj oponas aliajn propagandi per Esperanto revolucion, marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong, kaj aliflanke energie kolportas ideologion kaj vivmanieron de la burĝaro; ankaŭ la modernaj



## Letero de D. F. C. (Britio)

Mi multe dankas vin por via letero de julio kaj por la libreto *Deklaro de Kamarado Maŭ Zedong por Subteni la Batalon de la Usonaj Ni-gruloj kontraŭ Perforta Subpremo*. De kiam mi ricevis ĝin, mi tralegis tion multfoje kaj tutkore akordas kun la enhavaĵoj.

Mi nun havas la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* ĉe la tablo apud mia lito kaj mi nepre tralegadas unu sekcion ĉiunokte

antaŭ ol mi ekdormas; poste, mi pripensas la sekcion kaj zorge konsideras ĝin. Iuj okcidentuloj konstata ke la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* ne estas tia libro kiu nur aplikigas al Ĉinio; ili nepre kredas ke ĝi estas vera kaj ampleksa gvidlibro por helpi la tutajn laborantajn popolojn de la mondo. Ĝi enhavas solidajn konsilojn kaj prudentajn sugestojn por feliĉa kaj kontenta vivmaniero tra la tuta mondo.

Nur se la laboranta klaso unuiĝos kontraŭ la burĝoj kaj la tiel nomata 'socialista' registaro, ni povos konduki veran socialismon, t. e., la regon de la laboristoj, soldatoj kaj kamparanoj per si mem. Por tion fari, la saĝegaj vortoj de Kamarado Maŭ Zedong sendube treege helpas — jes, amiko, mi intence skribis 'helpas', ĉar multaj klarpensuloj (kiel mi)

en ĉi tiu lando nun konstatas ke nur via, la Ĉina socialismo estas la vera, sendifekta idealismo de Marks kaj Lenin, kaj la tiel nomata pseŭdo-'socialismo' de Anglujo, de Sovetunio kaj de aliaj landoj estas malestiminda aĉa deviismo.

## Letero de P. L. (Finnlando)

Mi unue volas tutkore danki vin pro la trezora libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiun vi sendis al mi senpage. Mi tralegas ĝin ree kaj ree, kaj fojo post fojo la geniaj pensoj de Prezidanto Maŭ Zedong pli klariĝas al mi.

Jam longe tre malĝojigis min, ke mankas al mi tio, kion kelkaj el miaj kamaradoj havas: la insigno kun la portreto de Prezidanto Maŭ. Mi do petas, ke vi bonkore sendu al

reviziistoj de Sovetunio kaj orient-eŭropaj landoj uzas ĝin por disvastigi reviziismon. Pere de la burĝaraj homaranismo, esperantismo kaj pacismo, ili paralizas la batalvolon de la revoluciaj popoloj, nuligas la revolucionan batalon, eĉ malice atakas la novan Ĉinion kaj kalumnias marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong. Ĉio ĉi tio estas tre klara por la esperantistoj kiuj subtenas revolucionan veron kaj staras por justeco.

Nun ni kun granda ĝojo vidas, ke prenante Esperanton kiel armilon multaj revoluciaj esperantistoj en la mondo eldonas librojn kaj fervore aktivas, firme subtenas la patriotan kontraŭusonon batalon de la vjetnama popolo, subtenas la popolojn de Azio, Afriko kaj Latinameriko en ilia batalo kontraŭ novaj kaj malnovaj koloniistoj kaj sin okupas pri aliaj revoluciaj bataloj. Al tiuj esperantaj kunbatalantoj kaj amikoj, ni ĉinaj revoluciaj esperantistoj esprimas koran respekton kaj firman subtenon! Ni pli intime unuiĝu, faru kontribuon al la granda batalo por demokratio kaj libereco de la homaro, por la venko de socialismo kaj defendo de la mondpaco kontraŭ agreso de imperiismo!

Progreson en la nova jaro!

**La Redakcio**

mi tiun. Tre volonte mi akceptus ankaŭ kelkajn broŝurojn de propagando. Mi vidis tiujn en la angla lingvo ĉe mia kamarado, kaj ankaŭ mi tre bone komprenas la anglan lingvon, sed mi preferas Esperanton.

Mi esperas al vi prosperon en la kultura revolucio kaj en ĝia disvastigo tra la tuta mondo! Vi havas amikojn ankaŭ en Finnlando.

**Letero de G. A. (Hispanio)**

Denove mi skribas al vi por sciigi vin ke mi ricevis alian paketon enhavantan la du numerojn de EPC kun kio mi jam estas ricevinta plu aktualajn raportojn pri la aktuala stato kaj marŝo de la Popola Ĉinio kaj pri la entuziasmo kiun la penso de Maŭ Zedong vekas en la tuta po-



### **LA JAPANA REAKCIA REGISTARO GRANDSKALE PLIIGAS MILITELSPEZOJN**

Por kontentigi la agresajn bezonojn de la usona imperiismo kaj plirapidigi la reviviĝon de sia militarismo, la reakcia registaro de Japanio grandskale pliigis la militan buĝeton por la venonta jaro.

Laŭ la raporto de la japanaj burĝaraj ĵurnaloj en la 30-a de aŭgusto, surbaze de la "tria plano por plivastigo de armado", la japana "Defenda Agentejo" publikigis, en la 29-a de aŭgusto, la buĝeton (projekton) de militelspezoj por 1969 kun sumo de 497,700 milionoj da japanaj jenoj. Tiu sumo estas je ĉirkaŭ 18% pli granda ol tiu por 1968. Kaj tiu buĝeta projekto ankoraŭ ne inkluzivas la elspezojn por novtipaj batalaviadiloj, kiujn uzos la japanaj "Sindefendaj Trupoj". Se oni adicias ilin al ĝi, la efektivaj

polo, kio estas la kaŭzo de arda laboro kaj faras grandajn progresojn en la sferoj de agrikulturo, industrio, arto, ktp.

Tre kore mi dankas vin pro viaj sendaĵoj kaj informoj. Ĉi tie ĉiuj, esperantistoj kaj neesperantistoj, ĝojas ĉiufoje kiam alvenas unu el viaj sendaĵoj. Kaj mi miras pri via bonega revuo tiel bone prezentata kaj ilustrata kiu entenas tiom da informoj pri Ĉinio, Vjetnamio, ktp.

Ni multe ĝojus, ke mi povos havi kelkajn verkojn de Maŭ Zedong en Esperanto kaj ĉefe la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en Esperanto kaj eĉ en la hispana lingvo, por ke tiuj kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton povu legi tiun libreton kiu kondensas la penson de Maŭ Zedong.

militelspezoj sumiĝos proksime al la totala militelspezo por la "unua plano por plivastigo de armado" (1957-1961) kiu estis 647,600 milionoj da japanaj jenoj. Rezulte de la grandskala plimultigo de milita buĝeto, la japana "Defenda Agentejo" fondos en la venonta jaro novan trupon armitan per telestirataj misiloj de-tero-al-aeraj de tipo Nike en la meza parto de Hokkaido, kaj planas konstrui "patrol-ŝipojn", submarajn boatojn, diversspecajn aviadilojn kaj tankojn. Krome, pliigis la nombro de armeanoj je 7,800.

### **GRANDA NOMBRO DA JUNULOJ EN FRANCIO SUFERAS SENLABORECON KAJ SENEDEKCON**

La artikolo "Senlaborecon Alfrontas Junuloj" aperigita en la franca ĵurnalo *Paris Jour* raportis, ke nun en Francio junuloj aĝantaj 14-20 jarojn nombras pli ol 5,000,000, el kiuj 2,800,000 ne havas eblon viziti lernejojn kaj 250,000 estas senlaboraj. En tio precipe suferas la idoj de laboristoj.

### **TANOM-PRAPHAS-KLIKO EN SERVO AL LA AGRESO DE LA USONA IMPERIISMO AL VJETNAMIO**

Laŭ informo de tajlandaj ĵurnaloj, unu el reakciaj ĉefoj de la naciperfida kliko de Tanom Praphas konfesis, ke la tajlanda Meteorologia Departemento jam delonge fariĝis instrumento de la usona imperiismo por plivastigi la invadan militon en Vjetnamio. Ĝi konstante uzas balonojn kaj instrumentojn provizitajn de Usono por fari esplorojn pri alta aero kaj spacego kaj sendas raportojn al Usono. Tiaj materialoj helpas la usonan aerarmeon en ĝia milita planado en Vjetnamio.

Krome, la usona imperiismo ankaŭ investis pli ol 4,000,000 dolarojn por fondi en la meza parto de Tajlando grandskalan centron de militaj komunikaj sputnikoj.

## Sur la kovrilo:

La granda proletara kultura revolucio pliflamigis al nia diversnacieca revolucia popolo la senliman amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la senliman kredon al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. La bildo montras Kurban Tulum en la celebra kunveno okaze de la fondiĝo de la revoluciaj komitatoj de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj de la urbo Urumĉi. Tiu maljuna ujgura malriĉkamparano estis iam akceptita de Prezidanto Maŭ.

## Sur la dorskovrilo:

Armeanoj kaj popolanoj de Lhasa varme solenas la fondiĝon de la revoluciaj komitatoj de Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj de la urbo Lhasa.

# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 12 (125) 1968

## Ĉefa Enhavo

Prezidanto Maŭ Ĝoje Celebris la Nacian Feston Kune kun la Tutlandaj Laboristaj Reprezentantoj kaj Ĉefurbaj Armeanoj kaj Civiluloj

Parolado de Kamarado Lin Biaŭ en la Celebra Kunveno de la 19-a Datreveno de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Vivu la Ĉiufanka Venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio!

La Laborista Klaso Nepre Devas Gvidi Ĉion

Nova Fizionomio de Kinghua-Universitato

La Ĉefforto por Reformi la Malnovan Mondon

La Naturo de la Laborista Klaso

Kiel Lernantoj de Laboristoj

Aklamoj de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj al la Revolucia Olepentraĵo *Prezidanto Maŭ al Anjuan*

Varma Kanto pri Prezidanto Maŭ

La Penso de Maŭ Zedong Gvidas Ilin Antaŭen

Negoco sub Bajonetoj

La Sovetunia Reviziismo Plirapidigas Siajn Paŝojn al Kapitalismo

Verkoj de Prezidanto Maŭ pri Militaj Aferoj Vaste Distribuiĝas tra la Tuta Mondo

# Bonega Situacio de la Tutlanda Agrikulturo

La alta tajdo de la revolucio levas altan tajdon en produkto. Firme respondante al la grandaj alvokoj de Prezidanto Maŭ “**tenu la revolucion kaj stimulu la produkton**”, “**lernu de Daĝaj en agrikulturo**” k. a., la kvincent milionoj da kamparanoj de nia lando antaŭenpuŝas grandpaŝe la agrikulturan konstruadon de nia lando laŭ la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj akiris riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj.

Liugi-a Popola Komunumo de Hingouŭ-gubernio, Hubej-provinco, denove akiris ĉi-jare riĉan rikolton de kotono.





*Supre:* Por akiri riĉan rikolton de koton, membroj de la Liuĝuang-a Brigado de la Kilijing-a Popola Komunumo, Henan-provinco, ekstermas fiinsektojn per nova aŭtomata ŝprucigilo fabrikita de nia lando, en la kotonkampo iam inspektita de Prezidanto Maŭ.

*Dekstre supre:* Kamarado Ĉen Jonguj, vicĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Ŝanhi-provinco kaj sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado, interkonsiliĝas kun komunumanoj pri la problemo **“teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**.

*Dekstre sube:* Akirinte riĉan rikolton la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ĉengguan-komunumo de Linkju-gubernio, Ŝandong-provinco, estas dankemaj al Prezidanto Maŭ kaj liveras sian bonan grenon al la ŝtato.





